5-a Jaro. N-o 244 APERAS SEMAJNE 6. Junio 1929



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LA USONA IMPERIALISMO

Usono minacas forrabi al la eŭropa industrio ĝiajn nepre necesajn merkatojn. Samtempe ĝi metas la manon sur la plej gravaj branĉoj de la eŭropa ekonomio, lokante tie pli kaj pli kompaktajn kapitalojn. Tiele Usono ŝajnas interesita samtempe pri la ruiniĝo kaj la prospero de l' malnova mondo.

Tiu ĉi paradokso estas dume facile klarigebla per rigardo al la okazoj lastatempaj. Oni vidas tie aperantaj la konturojn de la formoj, kiujn ricevos la ekstermiĝo de Eŭropo antaŭ la usona imperialismo.

Resumu ni kelkajn okulfrapajn faktojn.

La amerika elektra industrio, reprezentata esence de la Ĝenerala Elektra Kompanio (angla: General Electric Company), kiu superregis jam la francan produktadon (Thomson - Houston), kiu partoprenis en similaj entreprenoj en Italio, en Holando kaj Japanio, kaj kiu konservis rilatojn, diru ni... amikajn kun la grandaj elektraj "koncernoj" de Germanio, certigis al si tute novdate la regadon super la angla elektra industrio. Usono posedas sola — ne entenataj estas la partoprenoj en malpropraj entreprenoj — la duonon de la elektroteknika produktado de l' mondo.

La amerika aŭtomobila industrio instaliĝas en ĉiuj eŭropaj landoj, ĉu kreante proprajn fabrikojn, ĉu akirante la estrecon super naciaj entreprenoj. Ĝi portas la konkurencon, kiu ĝin mem vundas, en la landojn de l' malnova mondo kaj greftas siajn proprajn antagonismojn sur tiujn, kiuj jam sen ĝi tie ekzistas.

En la peza metalindustrio, provoj de alproksimiĝo, ankoraŭ timemaj, distingiĝas inter la kontinenta ŝtal-kartelo kaj la amerika ferindustrio. La kunlaboro estas jam pli reliefiĝinta por iuj specialaj produktoj, kiel la reloj.

En kvanto da aliaj branĉoj (kupro, petrolo, lampoj ktp.) la amerika posedakiro estas plenumita. Kaj ĉie, la usonanoj posedas la leonan parton, tiel ke ilia superregado estas efektiva, eĉ tie, kie ĝi ne esprimiĝas per la investo de kapitaloj en Eŭropo.

En multaj industrioj, la eŭropa ekonomio tendencas fariĝi simpla dependaĵo de l' usona ekonomio. Tiu ĉi tendenco manifestiĝas momente sub du formoj.

Aŭ la nordamerika kapitalo tute ampleksas la eŭropajn entreprenojn en internaciaj organismoj, kie ĝi estras ilin; aŭ ĝi leviĝas kontraŭ ilin kiel sola giganta entrepreno kontraŭ kelkajn malgrandajn dissemitajn produktantojn.

Se tiuj ĉi tendencoj plifortiĝas — kaj ili povas nur pligraviĝi kaj preciziĝi per la trudiĝanta evoluo! — la fatala sekvo aperas klare. En la unua okazo, la internaciaj organismoj, estrataj de l' usona kapitalo, fine koncentrigos la produktadon pli kaj pli en la plej potencajn fabrikojn kaj en la plej favorajn regionojn, tio signifas — unuavice en Usonon mem. La tutmonda raciigado, kiu anonciĝas en kelkaj branĉoj, kondukos fine al la fermo de l' eŭropaj entreprenoj. La posedantoj de ĉi tiuj fabrikoj havigos al si profitojn kiel antaŭe. La internacia trusto ĉi tiujn elpagos al ili proporcie al sia mondskala gajno. La laboristoj de l' fermitaj fabrikoj ekserĉos laboron aliloke; ĉu ili trovos?

En la dua okazo, la eŭropaj entreprenoj estos traktataj kiel nekonsiderindaj duaranguloj (angle oni havas la karakterizan vorton: "outsiders") de la usonaj posedantoj. Ili havos sian parton je merkatoj, se la aferoj bonstatas. Ili nelaboros ĉiufoje, kiam la plimalvastiĝo de l' merkatoj nur plue permesos al la giganto, kaj sole al li, forvendi siajn produktojn.

La lokigo de l' usonaj kapitaloj en Eŭropo do neniel kontraŭdiras la intereson, kiun havas Usono forpuŝi Eŭropon de ĝiaj merkatoj. Tio estas du aspektoj de unu sola kaj sama fenomeno. La amerika ekposedo kontraŭe nur ilustras ĝin kaj substrekas ĝian tutan gravecon.

Lucien Revo.

Per sia ekspluatado de l' mondmerkato formis la burĝaro la produktadon kaj konsumadon de ĉiuj landoj kosmopolite. Je granda bedaŭro de l' reakciuloj ĝi fortiris al la industrio la nacian grundon sub la piedoj. La pramalnovaj naciaj industrioj estis detruitaj kaj estas ankoraŭ ĉiutage detruataj. Ili estas forpuŝataj de novaj industrioj, kies enkonduko fariĝas demando de l' vivo por ĉiuj civilizitaj nacioj, de industrioj, kiuj ne plu enlandajn krudaĵojn, sed krudaĵojn apartenantajn al la plej malproksimaj terzonoj translaboras kaj kies fabrikaĵoj ne nur en la lando mem, sed en ĉiuj mondpartoj samtempe estas konsumataj. Sur la lokon de malnovaj, per enlandaj produktoj kontentigataj bezonoj enpaŝas novaj, kiuj postulas la produktojn de plej malproksimaj landoj kaj klimatoj por sia kontentigo. Sur la lokon de malnova loka aŭ nacia memsufiĉo kaj izoliteco enpaŝas universala interkomunikiĝo, ĉiuflanka dependeco de unuj nacioj de la aliaj.


(Ei "La Komunista Manifesto" de Marks kaj Engels, 1848.)

STRIKOJ EN ELDORADO — SUDA USONO

Rimarkebla tendenco en Usono estas la translokigo de l' industrio suden. En la sudo, laŭ reklamoj, laborist-sindikatoj ne funkcias; nenia alilanda bloŝevika influo agitas tie la modelan "nordikrasan" laboristaron. El la kamparo la eks-terkulturistoj ĝoje akceptas malaltan salajron. La nova fabriko restas 5 ĝis 10 jarojn sen loka imposto. Limigo de virin- kaj infanlaboro aŭ ne ekzistas aŭ ne aplikiĝas.

Ĉu oni povas miri en tiaj kondiĉoj, ke la teksejoj kaj ŝpinejoj en la urbo Filadelfio (Philadelphia) kaj en la nord-orienta distrikto de Nova Anglio (New England) komencas halti kaj fermiĝi? En la sudo la mastroj konstruis siajn proprajn vilaĝojn. Kelkaj mastroj estas diktator - filantropoj, sed plejparte ili ripetas la eksplauton el la komenco de l'kapitalismo ĉiuloke. Sekve ribelo elsaltas. Jen rubrikoj el ĵurnaloj dum aprilo:

Teksist-gvidantoj forŝtelitaj en teksejaj strikoj. — Striko komenciĝos plie en 15 ŝpinejoj. — Mezuril-horloĝoj kaŭzas strikon. — Ĉefo de Amerika Labor-Federacio garantias helpi en sudo. — Sudaj strikantoj minacitaj de elhejmigo. — Plano por sindikato el 300 mil tekslaboristoj en sudo. — Sangverŝo en sudaj strikoj. — Tri novaj strikoj en sudaj fabrikoj.



La detruita sidejo de l' strikkomitato de la Teksista Sindikato en Gastonia (Usono)

La du strikcentroj estas Gastonia kaj Ilizabitton (Elizabethton). Tre proksima al la limo de Suda Karolajna (Carolina) lokiĝas Gastonia en Norda Karolajna. Loĝas en tiu urbo 22 mil homoj, kaj en la najbareco 50 ŝpinejoj faras la kotonfadenon. Laborhoroj estas 12 ĉiutage kaj 11 nokte. Laŭleĝe infano devas atingi la dekkvaran jaron, antaŭ ol ĝi rajtas dumnokte labori en la fabriko, sed ofte okazas, ke ĝi pli fruaĝe noktlaboras. Por semajno la virinoj ricevas $ 5—10, la viroj $ 12 por 60-hora semajno. Ofte tri familioj loĝas en unu domo havanta nur 5 ĉambrojn.

La striko pro sindikat-rajtoj en Gastonia

La Nacia Teksista Sindikato, estrata de komunistoj, penis organizi la laboristojn tie en Gastonia, sed la unuaj 50 ĝis 60 anoj estis maldungataj. Proteste la 2-an de aprilo proksimume 11 mil ĉesis labori en fabriko de firmo Manville-Jeneks en la antaŭurbo Lore (Loray). Kaj de tiam kiel febro strikoj sporade okazis en la distrikto. Policanoj kaj soldatoj protektis la Lorefabrikon, kie plejparte la laboristoj strikis. Malpermesata estis strikparado en la strato. Oni arestis, bategis per revolveroj, pikis per bajonetoj la strik-pikedojn. Virinoj estis arestataj pro insultoj kaj "ebrieco". Denunco de la "senmoralaj, senreligiaj, ruĝaj, kontraŭ-registaraj, kontraŭ-patriotaj, sangverŝantaj" ktp. gvidantoj plenigis la lokan ĵurnalaron. Kial ne perforte forporti ilin? reklamis la civitana asocio. Responde maskita amasaĉo plene detruis la strik-oficejon (v i d u b i l d o n) kaj disĵetis la nutraĵ-provizon por la suferantaj strikantoj en la straton.

Dume la policanoj kaj soldatoj konvene protektis la "ordon" per surdiĝo. Nur unu pastro el 22 subtenas la strikon. La Lore-kompanio fanfaronas, ke 75% dumtage kaj 50% dumnokte el ĝia laboristaro daŭras labori. Mankas nutraĵo al la strikantoj kaj nun la kompanio eldomigas ilin. La sindikato postulas 5-tagan laborsemajnon (sume 44 laborhorojn), 20 dolarojn da minimuma salajro semajne, intertrakton kaj oficialan agnoskon de l' sindikataj reprezentantoj. La usona registaro havas Labor-Fakon, sed ne volas eĉ paroli kun la ruĝa komunista sindikato, kvankam la gvidantoj en Gastonia ne predikas komunismon, sed nur priatentas la salajron, labortempon ktp. de la teksistoj. Sed la Senato (t. e. dua parlamenta ĉambro) starigas oficialan enketon.

Pro la pliintensiĝo de l' ekspluato oni strikas en Ilizabithton

En Ilizabithton (en Tenesi) iom malsimilas la afero. Sed ankaŭ tie la kapitalistoj rifuzas intertrakti kun la sindikato, kvankam la Unuigita Tekslaborista Sindikato (U. T. W. laŭ angla titolo) apartenas al la konservativa patriota AFL (Amerika Federacio de Laboro). Pli bela, sed pli malgranda urbeto Ilizabithton enhavas 10 mil loĝantojn. Pro allogo de senimposta dekjara periodo la kompanio komencis konstrui fabrikojn. Antaŭ 2½ jaroj la "Bemberg-Glanzstoff"-korporacio komencis fabriki artefaritan silkon[1] kaj ĝuas bonajn dividendojn. La fabriko kaj ĝia instalo kostas 30 milionojn da dolaroj. 80% el la kapitalo posedas germanoj. El la 5500 laboristoj ²/₃ estas virinoj. La laborsemajno havas 56 horojn. Laŭ oficiala statistiko la meza salajro estas semajne por virinoj — $ 6, por viroj $ 12. La streĉo kaj pliintensigo de la laboro, la uzo de "faden-horloĝo" (t. e. mezurilo pri farita laboro) krom la ordinara ekspluato ribeligis la laboristojn. A. Hoffman kaj aliaj sindikatestroj alvenis por helpi en mezo de marto. Ĉar la organizado ĵus komenciĝis kaj ĉar antaŭe la sindikatoj tre malsukcesis en la sudo, estis proponita kaj subskribita la 22-an de marto k o n t r a k t o, laŭ kiu la laborsemajno kaj salajroj de la viroj restas senŝanĝaj kaj iom pli favore gradiĝas la virina salajro, ĝis ŝi ricevus 22—24 cendojn hore kaj semajne $ 10.80, $ 11.20, $ 13. La sindikato tendencis kreski en la distrikto kaj konstrui pli firman bazon. Sed la kompanio rifuzis agi laŭ la kontrakto kaj ĝiaj amikoj, la "Babbit"-oj de Ilizabithton, decidis perforte kapti la gvidantojn. Ili f o r r a b i s dumnokte Hoffman kaj O. Gradi kaj portis per aŭtomobiloj malproksimen minacante per revolveroj.

[1] La aŭtoro de nia artikolo proponas al ni la vorton "rajono" por artefarita silko laŭ la angla "rayon", por mallonge signi tiun novan industrion. Ni lasas la zorgon pri tiu vorto al la kompetentaj instancoj. — Red.

La fratino de la loka gvidanto Pinik fortimigis la "subtenantojn de usona libereco" per pafado je protekto al sia frato. Netimigite Hoffman kaj O. Gradi revenis al la urbo kaj ankoraŭ gvidas la protestmovadon de la 5500 strikantoj.

Ĝis nun la korporacio rifuzas negoci kun la sindikato spite la fakto, ke ĝiai du fabrikoj restas senvivaj. La pastroj ankaŭ tie ĉi estas kontraŭ la sindikato, kaj la Sav-armeo vane klopodas delogi atenton ĝis "la ĉiom bona en ĉielo". Laŭ kuranta raporto multe pli da soldatoj nun gardas la fabrikon per maŝinpafiloj, ĉar la kompanio kolektis multe da strikrompantoj por ekfunkciigi sian fabrikon.

"Prospero" estas la nuna religio de Usono. Tial ne estas permesebla al ĵurnal-korespondantoj blasfemi per priskribo en alilanda ĵurnalaro pri la makuloj en la suna sudo. Sed ja ili ekzistas. Eĉ se la protestmovado vane forpasus, la ekzemplo infektas la sudan laboristaron kaj la kapitalisto devos serĉi novan sensindikatan Eldoradon.

(488)

Oni vendas siajn privilegiojn!

K-do Ino-Kor (1307), Novjorko, komunikas al ni la tradukon de dokumento, kies originalon li tenas en manoj. Temas pri letero de grafidino Pia von Ŝtraĥvitz (germ.: Strachwitz), posteulo el malnova silezi-aŭstria nobela familio, kiu perdinte siajn riĉojn turnas sin al amerikanoj, petante, ke ili aĉetu ŝian nobeltitolon.

Ĉiuj laboristoj memoras, kiel alte fieris la nobelaro super la "vulgara popolaĉo" kaj eĉ super la ordinara burĝo. Kaj jen! ... tiuj vantuloj vendas sian nobelecon al riĉaj vulgaruloj. Al eksterlandano, eĉ "malamik-landano" ili fordonas por ora kompenso tion, kion ili ricevis privilegie pro supera naskiĝo aŭ pro favoro de iu glora regnestro, al kiu plaĉis distingi ilin. Kiel oni vidas, ankaŭ la plej malvulgara aristokrato preferas kontentigi siajn materiajn bezonojn, vivante kiel sendistinga simplulo, ol malsatmorti "en honoroj kaj gloro".

SENBRIDA FAŜISMO EN JUGOSLAVIO

Longtempe la faŝismo furiozis sub la protekto de la reĝo, por erarigi la mondproletaron, por kaŝi siajn kruelajn manipulojn, kiuj similas al la mezepoka inkvizicio. Tamen la reĝimo devis fine malkaŝe montri sian veran vizaĝon. Tio okazis en januaro 1929, kiam la reĝo disirigis la parlamenton kaj fondis faŝistan, militistan registaron kunligitan kun militarista diktatoreco, kiu servas la interesojn de la serba hegemonia burĝaro, pli bone dirite, la anglan-francan imperialismon, kies verko estas la jugoslava faŝismo.

De januaro la revoluciaj laboristoj amase estis arestataj kaj enkarcerigataj. Ekzistas fama subtera malliberejo "Glavnjaĉo", konstruita de la turkoj dum la dekoka jarcento, en Belgrado. En tiu karcero oni turmentegas la arestitojn per mezepokaj turmentiloj (varmegaj feraĵoj ktp.). Eĉ burĝaj opoziciaj gazetoj devis konfesi la terurajn cirkonstancojn regantajn en tiu malliberejo.

Depost januaro la laboristaj gazetoj estas malpermesitaj same kiel la sendependaj sindikatoj. Ĉie arestoj kaj turmentoj al sindikatgvidantoj kaj aktivuloj. La jugoslava faŝismo ne bezonas honti antaŭ la mondkonataj pendigistoj Musolini, Cankov kaj Horti. Tion montris la lastdata besta kaj sanga ago de jugoslavaj ĝendarmoj.

En aprilo du konataj revoluciuloj K-doj Djakoviĉ kaj Hetjemoviĉ estis arestataj kaj de la ĝendarmoj mortigataj barbare kaj beste en arbaro. La ĝendarmoj asertas, ke la K-doj volis forkuri dum sia transporto, kaj tiel ili estis mortigataj. Al la laboristaro jam delonge estas konataj tiaj mortigoj "dum forkuro".

K-do Djakoviĉ estis laboristo, kiu 24 jarojn aktive laboris en la movado. Li estis jam antaŭ la milito persekutata de la aŭstra absolutismo. Dum la milito li estis mortkondamnata, sed poste amnestiata. Post la disfalo de l' aŭstra absolutismo li daŭrigis sian revolucian laboron en la nove fondita Jugoslavio. Post la milito li estis elektata deputito por la parlamento, kie li daŭrigis sian agadon por la interesoj de la laborista klaso. Oni arestis, kondamnis kaj turmentis lin ... Vane ĉio, li neniam oportuniste perfidis la laboristaron. La burĝaro vidis ja bonege, ke K-do Djakoviĉ celis nur detruon de la kapitalista socio kaj liberigon de la laboruloj. Tial la faŝismo decidis mortigi lin. La saman sorton trovis K-do Hetjemoviĉ.

Tiuj K-doj donis sian vivon por la liberiĝo de l' Proletaro. La revolucia laboristaro neniam forgesos tiun ĉi barbaran mortigon. Ne daŭros eterne la triumfo de la faŝismo, de la imperialismo. Ni jugoslavaj revoluciuloj kune kun la tutmonda laboristaro daŭrigos la laboron de niaj mortintaj K-doj. Ili mortis, vivu ilia laboro!

V o l s ú s.

SUB LA UNUAMAJA STANDARDO!

(R a p o r t o e l B u l g a r i o)

La granda Festo de Laboro kaj Batalo ĉi-jare okazis preskaŭ ĉie je furioza teroro kaj sangverŝo. Ankaŭ la bulgara reakcio ne restis malantaŭe. Dum tuta monato la polico turmentadis ĉiujn laboristajn organizojn kaj pli agemajn K-dojn. Konfiskado de gazetoj kaj alvokoj, aresto de redaktoroj, torturo al laboristoj en multnombraj policejoj, batado, insultoj — ĉiuj konataj rimedoj de l' rafinita polico estis uzataj. Antaŭ ĉiuj grandaj fabrikoj kaj laborejoj estis konstantaj policpostenoj. En la fabrikoj mem-sekretaj policanoj. En multaj fabrikoj la laboristoj estis minacataj, multaj estis arestataj kaj kondukataj al la polica direkcio (konfiskata estis grandega kvinetaĝa domo — antaŭa klubejo de kompartio). Precipe oni arestis la parti-aktivulojn. Evidente la polico volis senkapigi la movadon, por ke la ago ne okazu.

Malgraŭ tio, ke Sofio je la 1-a de majo similis al militista tendaro, la laboristaro kuraĝe festis sian grandan tagon. En teatro "Renesanco" estis aranĝita kunveno. Sed la ministra konsilantaro je la antaŭvespero ĝin malpermesis (malgraŭ ke laŭ leĝoj publikaj kunvenoj okazas sen ricevo de speciala permeso). Sed la laboristoj alvenadis. La "kuraĝa" kaj "maldorma" polico komencis novajn arestojn. Ĉirkaŭ la deka horo estis arestitaj pli ol cent personoj. Iuj fabrikoj estis fermitaj, por ke la laboristoj ne eliru. Tiel ili restis ĝis la vespero.

Interpuŝiĝo kun la polico

Je la 10½-a multaj gelaboristoj kolektiĝis sur placo en iu malriĉa kvartalo. Tie sub ruĝa standardo komenciĝis la unuamaja kunvenego. Komencis paroli K-do Kalajĝiev (delegito ĉe la kontraŭfaŝisma kongreso en Berlin, deputito de Lab. Partio). En sia parolado li pledis por ĉiuj devizoj de la Unua de Majo. Dume alvenis la polico: rajdantaj policanoj, aŭtomobiloj plenaj je ĝendarmoj kun ponardoj surpafile, ordinare vestitaj agentoj k. s.

Ili komencis pafi kaj per boksado forpeli la ĉeestantojn. Sed neniu foriĝis. Respondis la amaso per kantado de l' "Internacio" kaj ekkrioj: "For la faŝismon!" "Vivu la 1-a de majo!" Ĉiuj estis viglaj kaj kuraĝaj. La polico ekiris al la standardo. Sed unu grupo da laboristinoj ĝin ĉirkaŭis kaj ne permesis ĝin forpreni. La polico montris grandan "heroecon" batalegante kontraŭ ĉi tiuj laboristinoj senŝirmaj per vipoj kaj pafilkapoj. Pli poste la polico kaptis la standardon kaj arestis post longa baraktado ĝian portanton, la sekretarion de la Lab. Partio. Estis arestataj krome kelkdeko da laboristoj kaj la kunvenego estis fine dispelata. Tamen la entuziasmo kaj batalpreto estis pliiĝintaj. La polico bone komprenis tion kaj okupis la stratojn, dispelante la manifestantajn laboristajn grupojn.

En la provinco regis ankaŭ la en faŝistaj landoj konata teroro. Malgraŭ tio en multaj vilaĝoj kaj urboj la laboristoj festis. Eĉ en la malliberejoj la politikaj malliberuloj partoprenis.

La ago de la malliberuloj

En Centra malliberejo apud Sofio estis deklarata malsatstriko en 1-a de majo. Kelkajn tagojn antaŭe la direktoro elvokis la politikulojn kaj diris antaŭ ili, ke estos uzataj eĉ pafiloj, se ili festos la 1-an de majo. La vesperon antaŭe estis donataj pli ol 100 skribopetoj de preskaŭ ĉiuj politikaj malliberuloj, per kiuj ili deklaras unutagan malsatostrikon okaze de la granda festo de Laboro, pledante por ĉiuj ŝignalvortoj de l' proleta klasbatalo.

Je la 7-a horo de l' unua de majo eniris la ĉelojn de l' politikuloj la ofica mallibereja personaro. Kun furiozaj vortoj ili sin ĵetis antaŭen kaj faris provon dekroĉi la ruĝajn rubandetojn de l' malliberuloj. Sed la lastaj tiel kontraŭstaris, ke eĉ post kelkfoja provo la personaro ne sukcesis. Tiam oni elvokis en la deĵor-ĉambron la pli konatajn K-dojn kaj traktis ilin per pugnobatoj, piedfrapoj kaj kaŭĉuka bastono. Sed eĉ post tio ili rifuzis fari la volaton. Sur la brusto de K-do Ĉakov oni apogis ponardojn kaj minacis lin, sed li daŭre rifuzis plenumi tion, kion ili postulis. Post la rifuzo komenciĝis pafado en la apuda koridoro. Ankaŭ tio ne helpis. Oni batis lin per pafilkapoj. Vane. Tiam oni katenis lin kaj ĵetis en karceron.

Preskaŭ la samo okazis kun K-do Stajkov, redaktoro de "Laborista afero". Li deklaris antaŭ la policianoj, ke li ne demetos la ruĝan rubandeton, ĉar li skribis en la gazeto, ke la laborista klaso devas festi m a l g r a ŭ ĉ i o la 1-an de majo. Rezulto: katenoj kaj karcero. Kun K-do Vlado Tomov, izolita, okazas jeno: Li ne demetis la ruĝan rubandeton, malgraŭ la minacoj; li kantadis revoluciajn kantojn. Novaj minacoj — li kantadis. Katenoj kaj karcero estas la rezulto. Batitaj kaj enkarcerigitaj estas ankoraŭ multaj K-doj. Ĉiuj ili partoprenis la feston de Laboro kaj la malsatstrikon.

Ankaŭ en la distrikta malliberejo en Tirnovo ĉiuj estis enkarcerigataj pro la "krimo" esti alkroĉintaj sur siaj vestoj ruĝajn rubandojn. En ĉiuj malliberejoj tra la lando, kie estas politikaj malliberuloj, tio sama okazis.

S a t a n i d o.

Aperas nuntempe verkaĵoj kun scienca aŭ teknika karaktero, kies enhavo havas, aŭ celas havi universalan karakteron, en pli ol dudek eŭropaj lingvoj malsamaj. Estas malproksima la tempo, kiam per la nura kono de la latino oni povis legi ĉion, kion skribis en Eŭropo la kleruloj kaj filozofoj, kaj kiam ĉiuj pensuloj sin interkomprenis facile per unu morta lingvo.

A. M e j e (france: Meillet).

La teroro kontraŭ la laboristaj organizoj en Polio

Hodiaŭ ni konstatas en la revolucia movado de Polio, ke la leĝaj kaj malleĝaj politikaj partioj, la profunuiĝoj, kulturaj kaj sportaj asocioj de la laboristoj estas plenigitaj de homaĉoj-provokistoj. Kiu nur iomete estas suspektata pro simpatioj al la kontraŭfaŝisma movado, tiu tuj estas malliberigata kiel "kontraŭŝtatulo". Ĉiuj ĝis nun okazintaj politikaj procesoj elmontris, ke nur dank' al provokistoj senkulpaj homoj estas kondamnitaj je longjara malliberejа puno.

La fermo de l' kulturaj, sportaj lab. asocioj, profunuiĝoj kaj politikaj partioj okazas plejparte dank' al la "laboro" de tiuj provokistoj.

En la "defensivo[1]" troviĝas "nigra listo" en kiun oni skribas la nomon de l' suspektato. Pli ol 150 mil nomoj estas jam notitaj en ĝi. Ĉiu enregistrito estas spionata. Ĉe plej eta okazo tia homo tuj estas malliberigata. Ankaŭ ekzistas listoj de agentoj kaj provokistoj, kiuj estas ĉiuj konataj per sia numero. Multaj konataj revoluciuloj estas enskribataj tiujn listojn, por povi en konvena tempo disvastigi la famon, ke ili estis provokistoj kaj ĵeti en la koron de l' laborulaj amasoj malfidon al ili. La provokistoj disvastigas famaĉon inter la laborula amaso, ke ĉi tiu aŭ tiu revoluciulo, maldekstra gvidanto, estas suspektita havi interrilaton kun la polico, por per tiaj fiagoj malfortigi la movadon de la revoluciema proletaro. En fabrikoj kaj laborejoj la spionoj sciigas la estrojn kaj "defensivon", kiuj laboristoj estas maldekstruloj, kaj tuj ĉi lastaj estas maldungataj. Ili nenie ree trovos laboron, ĉar neniu entreprenisto dungos laboriston kun revoluciemaj sentoj.

La "ekonomia" teroro estas speciale uzata rimedo de l' faŝismo, por disbati kaj faŝismigi la faksocietojn. En la ŝtataj fabrikoj estas dungataj nur tiuj, kiuj apartenas al faŝistaj profesi-unuiĝoj. La plej granda fervojista unuiĝo estas faŝismigita. Ĉiuj fervojistoj estas devigataj membriĝi ĉe tiu faŝista militorganizo. Granda elcento el la pago estas forprenata por militaj elspezoj. La laborista sportmovado estas devigata allasi al siaj societoj militajn kapitanojn, kiuj gvidas ĝin, militigante la tutan

Ĉu ĉiuj
laboristaj esp-istoj en via loko
jam konas k abonas
la ĉiusemajnan 12-paĝan
"SENNACIULO"n
?
Se ne, montru al ili vian gazeton k invitu ilin al abono. . . Ne forgesu, ke "S-ulo" bezonas ĝis la Leipziga Kongreso (aŭgusto 1929) almenaŭ
4000 abonantojn!

laboron. Kiuj kontraŭstaras, estas arestataj, la societoj fermataj.

Sed la laborula amaso en Polio, ukrainoj, blankrusoj, judoj, germanoj, poloj k. a. kontraŭbatalas mano en mano la blankan teroron, la faŝismon. Sub la gvido de l' maldekstraj organizoj kaj kom. partio ili defendas siajn rajtojn kaj batalas por la socialismo.

Rolo Popfil.

[1] La polia politika polico.

PRI NEDERLANDO

Same kiel la artikolo en n-o 242 ĉi tiu sekvanta okupas sin pri la artikolo de K-do I. F. aperinta en n-o 239 sub la supra titolo. Ĉar la subaj linioj rilatas speciale al laborkondiĉoj kaj salajro de l' nederlandaj laboristoj, ni opinias ĝin koniginda, ankaŭ pro la diversaj ĝustigoj faritaj en ĝi. Red.

La meza salajro de la holandaj laboristoj estas 35—45 guldenoj semajne, skribis K-do I. F. en n-o 239. Kaj la laboro estas plej ofte kompensata monate! La verkinto de l' menciita artikolo jam forlasis Holandon kaj reveturis Anglion. Mi devas atentigi lin, ke se li ankoraŭfoje vizitos eksterlandon, li informiĝu pli bone pri laboristaj salajroj, antaŭ ol publikigi tiun neveran artikolon en "S-ulo".

Nun mi demandu K-don I. F., kial li post kvinmonata restado forlasis Holandon, se la salajro de la laboristaro estas tiel alta? Mi mem respondas al li: Vi tre bone sciis, kiom la laboristaro perlaboras semajne, kaj se tiel estus, kiel vi skribis, vi certe ne forlasus Holandon, ĉar vi sendube ricevus laboron en alia fako ol en via. Sed vi sciis, ke la laboro ne tiom multe enspezigas, kiel por vi la anglaj lecionoj, kiujn vi donis. Vi kiel instruisto postulis po horo 2 guldenojn, kaj la aliaj devas laboregi 4—5 horojn por laborakiri 2 guldenojn. Nur pli altaj oficistoj akiras 35—45 guldenojn semajne. Oni povas diri, ke tio estas nur 10% el la tuta holanda laboristaro. Kaj la ceteraj 90% perlaboras 20—30 guldenojn semajne, ankaŭ pli malmulte. Oni povas diri, ke la meza salajro estas 25—28 guldenoj semajne.

Ankaŭ ne estas vere, ke la plejmulto estas kompensata monate! Nur oficistoj, instruistoj, fervojistoj kaj la ŝtataj laboristoj estas monate kompensataj. Tio estas 10—15%. Mi estas ankaŭ eksterlandano kaj devenas el Vieno. Ĉar mi

La morto de la virgulino

Okaze de la 500-jara datreveno de la batal-elpaŝo de Johanino d' Ark aperis en n-o 240 fruntpaĝe artikolo mia pri ŝia rolo. Mi diris en ĝi, ke pri ŝia vivo kaj agado ekzistas diversaj historiaj rakontoj, el kiuj neniu povas pretendi trafi la veron. Mi apogis min je la tezoj prezentitaj en la konata verko de A. Frans, *kiu mem ĉerpis el plej diversaj fontoj. K-do* Arco *(909) verkis nun pri la sama temo disertacion, rimarkigante, ke ĝi prezentas la vivon de Johanino laŭ la* n u n a s t a t o *de la scienco. Ciuokaze restas konjektoj kaj hipotezoj. Tamen ni opinias, ke la traktaĵo estos interesa por nia legantaro.* N. B.

Duonmilo da jaroj pasis, de kiam la Orleana Virgulino sur fronto de la franca armeo ekatakis sieĝantojn de Orleano. Bruaj naciistaj festoj memorigis tiun datrevenon. Post du jaroj la naciistoj kaj ekleziuloj ree festos, nome la kvincentan datrevenon de ŝia morto martira, al kiu fordonis jam neuzeblan ilon la nobelaro kaj pastraro. Sed . . . la homoj — certe malbonaj homoj — ĉiam diras sian "sed". Ĝi estis ja la unua ribela vorto de l' Satano — Lucifero — la Lumportanto . . .

Antaŭ ol la granda franca revolucio forbalais ĉiujn blazonojn kaj feŭdajn titolojn, oni povis vidi en Metz, super pordego de la domo de nobela familio d' Armŭaz (france: d' Harmoises) blazonŝildon kun surskribo: "Jehanne des Armoises Pucelle de France" (t. e. Johanino dez Armŭaz, Virgulino de Francio). La familio fieris pro sia deveno de la . . . Virgulino!

Kio do? Ĉu ŝi ne ĵuris sankte "resti virgulino" (cetere — "quamdiu placuit Deo" — ĝis kiam plaĉos al Dio)? Ĉu la Virgulino ne mortis martire en Ruen (Rouen) la 31. majo (aŭ 14. junio, aŭ 6. julio — eĉ samtempuloj ne sciis precizan daton) en jaro 1431? Ĉu ne akompanis ŝin ĝis la fatala brulŝtiparo la pia frato Marteno Ladvenü (L'Advenu) kaj saĝa majstro Johano Masjö (Massieu)?

Ĉu oni ne vidis — atestas ja la fidindegaj aktoj de la kanoniza proceso — forflugi blankan kolombon el la ardantaj flamoj? Ĉu ne atestas ŝian sanktan, mirindan ĉastecon la adoro de l' homaro[1], laŭtaj preĝoj kaj grandiozaj temploj? Kaj la honorinda magistrato de l' urbo Orleano — ĝi ja certe ne senkaŭze elspezadis depost la jaro 1433 sufiĉe grandan sumeton je solenaj diservoj pro kvieto de l' animo de la sankta kaj glora Virgulino.

Kaj tamen . . .

Sinjoro Parsevalo de Kanjo (Cagny) delonge staris en densa amaso atendanta sur la ĉefplaco de Ruen komencon de spektaklo: oni estis bruligonta la herezulinon kaj sorĉistinon Johanino d' Ark. Spektaklo efektive estis vidinda — ĉiam ja estas agrable vidi pereon de la malamikoj de la Sankta Eklezio. Kial tamen kontraŭ la ĉiam observata kutimo oni kondukis la ekzekutotinon "kun vizaĝo kovrita per vualo"? Kial la anglaj taĉmentoj neniun lasis de proksime ĝui vidon de meritita morto de l' krimulino? Nu, certe, ŝi penis ja trifoje forkuri. Pro ŝia liberigo pledis kaj intervenis la princino de Bedford kaj Johanino de Luksemburgo. Onidire eĉ la juĝinta ŝin episkopo Koŝon (Cauchon) aŭdigis kelkajn suspektindajn vortojn pri pacienco ktp. Do — ĉu oni volis malebligi liberigon, forkuron aŭ . . .?

Ĉio ĉi pensigis iom la ĉeestintojn kaj neĉeestintojn. "Fine — skribas nekonata

[1] T. e. pastroj kaj ties piaj ŝafidoj. — M. A.

estas depost la oktobra revolucio 1918 preskaŭ 5 jarojn senlabora, mi elmigris de Aŭstrio por serĉi laboron en eksterlando. Dank' al mia esperanta scio mi tramigris piede la tutan Germanion, kie mi en esperantaj rondetoj ĉie estis bonvenigata. Finfine mi alvenas en Aalsmeer, kie mi ricevis de esp. K-do, kiu mem estas florkulturisto, laboron. Kaj mi ankoraŭ laboras kiel helpĝardenisto.

Mi komencas labori matene je la 6-a, laboras ĝis la 12-a, kaj poste de la 13½-a ĝis duono post la 18-a. Kaj mi perlaboras semajne 25 guldenojn. Sed mi devas esti kontenta, ke mi tiom ricevas. Ĉar pli ol 50% ricevas nur 18—22 guldenojn semajne en nia fako. Kaj tio estas la kaŭzo, ke la laboristaro ne estas organizita kaj la florkulturistojposedantoj dungas plej ofte eksterlandanojn, kiuj pli malkare laboras ol la holandanoj. Sed tiun longdaŭran labortempon ni havas nur dum la somero; dum vintro ni komencas je la 8-a matene kaj laboras ĝis la 16-a kun unu kaj duona horo da tagmanĝa paŭzo.

Se tiel estus, kiel K-do 3398 skribas, mi evidente povus aĉeti al mi ĉiusemajne tutan vestaĵon por 30 guldenoj aŭ 3 parojn de ŝuoj! Ĉar 13—15 guldenojn fraŭlo devas pagi semajne por manĝaĵo, loĝado kaj tolaĵlavado, restus al li 30 guldenoj! El tio la legantoj povas vidi, ke la verkinto en n-o 239 iom fanfaronis pri la holandaj cirkonstancoj. Franz Belič (13242).

★ DIVERSAĴOJ ★

Miraklo

(Vera okazintaĵo)

Ĉu nuntempe ankoraŭ okazas mirakloj? Verŝajne. Jen miraklo okazinta antaŭ nelonge en urbeto de la Fiĥtelmontaro[1].

Sidis ŝuisto kun sia lernanto trankvile laborante en sia laborejo. Subite splitiĝas la fenestra vitro, ŝajne tute senkaŭze. Ne eksciinte la motivon, oni riparis la fenestron. Daŭris nur mallongan tempon, kaj la vitro ree dispeciĝis. Kio estas tio? oni demandis. La strato estas mallarĝa kaj eble "bona amiko" el kontraŭflanka najbararo intencis ĉagreni la ŝuiston. La afero estis denuncata al la polico, kiu tuj kaŝe observis la najbarajn fenestrojn, ne rimarkante ion suspektindan, dum la vitro refoje brue krevis.

Sendube miraklo, neesplorinda. — Estis ĉirkaŭata la domo de embuskantoj. tamen nenian kaŭzon oni rimarkis. Raportis la gazetaro pri la stranga afero. La publikaj opinioj estis tre diversaj. Kreduloj asertis, ke en proksima malnova turo jam fantomoj aperis. Aliaj personoj moke priparolis la okazintaĵon.

Iun tagon, kiam "la fantomo" refoje vagis, estis rimarkebla ŝunajlo en la fenestra randmureto. Tio fine montris la vojon, kie estis trovebla la signo pri la krimulo. Ŝajne kviete laborante la lernanto lerte klaketis najlon kontraŭ la fenestron.

Nun la nematurulo estis devigata aperi antaŭ la juĝistaro. Sed ne ekzistis leĝaj paragrafoj por lin puni pro tio. Multaj personoj eĉ opiniis, ke la friponeto meritas laŭdon. 2419, Selb.

[1] Bavario.

La "stultaj rusoj"

Dum la lasta mondmilito mi estis kiel germana soldato en Rusio. Aŭtune de 1916 nia taĉmento troviĝis en la Rokitno-marĉoj. Inter ni kaj la plej antaŭa linio de la rusoj estis nur la mallarĝa Oginski-kanalo. Ni bone povis aŭdi precipe dum la noktoj, kiel gaje la rusoj ridis kaj kantis. La unuan vesperon, kiam ni gardostaris ĉe la bordo de la kanalo, ni ricevis por la nokto la signalparolon "Helmkappe[1]". Ni miris pri la stranga vorto, ĉar kutime la signalparolo estis nomo de iu urbo aŭ generalo. Kiam la duan vesperon, tute kontraŭ la kutimo, ni ricevis denove la saman signalparolon "Helmkappe", ni ne povis reteni nin kaj demandis nian superulon, ĉu tio ne estas eraro. Li respondis: "Tute ne, oni elektis intence tiun vorton, ĉar la rusoj ne havas en sia alfabeto la literon 'h'. Pro tio ili ne kapablas elparoli ĝin kaj dum la noktoj tuj je la elparolmaniero niaj patroloj ekkonas, ĉu estas germano aŭ malamiko, kiu alproksimiĝas!" Dumtage ni estis en kabanoj iomete malantaŭ la fronto kaj ĉiuvespere dum la krepusko ni ekmarŝis por okupi niajn postenojn ĉe la bordo de la kanalo. Dum tri semajnoj ni havis la saman signalparolon "Helmkappe". Je la tria vespero jam, kiam ni alproksimiĝis al la kanalo, la rusoj salutis nin de la alia flanko en tute korekta maniero per nia signalparolo "Helmkappe". Dum la nokto, kiam niaj patroloj venis al nia posteno kaj kiam ni alvokis ilin postulante la signalparolon, tuj la rusoj respondis centope: "Helmkappe". Ni ridis pri tio, same ankaŭ niaj "malamikoj". Estis bone por ni, ke estis tie tute trankvila frontsektoro. Ŝajne pro la danĝeraj marĉoj en tiu regiono oni ne riskis atakon, nek de nia, nek de la rusa flanko. La postan tagon ni kompreneble raportis al niaj superuloj, ke la rusoj same bone kiel ni elparolas nian signaldiron "Helmkappe", kiun ili ja dum du antaŭaj noktoj ofte aŭdis de niaj postenoj kaj patroloj. Sed niaj oficiroj ne kredis tion, unu eĉ alkriis nin: "Vi estas ebriaj! Estas absolute neeble, ke ruso

[1] Helm = Kasko. Kappe = ĉapo.

samtempulo — oni bruligis publike ŝin aŭ iun alian virinon, similan al ŝi, pri kio multegaj personoj opinias diverse." Necerteco kreskis. Angloj spitis ĝin, francoj tamen rakontis laŭte, ke la tuta afero estis trompo, ke la Virgulino vivas ie kaŝite. Kaj jen — aperis la saviĝinta heroino. Duboj rapide fariĝis certeco por... despli rapide reveni. Ne estis facile ekkoni trompulinon; vivis ja ankoraŭ patrino kaj du fratoj de Johanino.

Pasis kelkaj jaroj. Jakobo Larĵantje' (L'Argentier), honorinda trezoristo de la urbo Orlano, ĉiujare notis en la urba spezlibro sumeton por mesoj pro l' animo de l' Virgulino. Apud tiuj ciferoj tamen aperas en j. 1434 kaj daŭras ĝis j. 1436 sufiĉe oftaj elspezoj por la kurieroj, kiuj alportadis leterojn de "Johanino la Virgulino"! Gravaj devis esti ĉi tiuj leteroj, gravajn aferojn pritrakti, se la magistrato sendadis ne ordinarajn urboservistojn, sed heroldojn de la urbo. Kaj tiuj heroldoj estis du fratoj de la mortinta (laŭdire) Johanino d'Ark!

Kelkajn jarojn poste en j. 1439 venis urbon iu "sinjorino Johanino dez Armŭaz" solene kaj honore akceptata de la magistrato pro la "meritoj, kiujn ŝi akiris dum sieĝo de la urbo". Kiu do estis tiu sinjorino d' Armŭaz? Laŭ notoj de la dekano de preĝejo de Sankta Tibo (Thibaut) en Metz ŝi estis edzino de nobelo Roberto d'Armŭaz. Kvankam sinjoro d'Armŭaz tute ne estis iu altrangulo, sed simpla, bonhava kavaliro, lian edziĝ-festenon en Arelon (Arelont) ĉeestis multaj eminentuloj de la reĝa kortego. Kaj ĉiuj ĉi personoj ĉeestis ankaŭ iam solenan kronadon de reĝo Karolo VII. en Reims, kronadon, kiun preparis kaj ĉeestis la Virgulino. En jaro 1436 la 20. majo sinjorino Johanino vizitis Metzon kaj akompanis ŝin la du heroldoj de la urbo Orleano, du fratoj de Johanino d' Ark.

Kiu do estis sinjorino d' Armŭaz? La respektinda dekano ne dubis, ke ŝi estis la heroino de l' centjara milito, ne dubis ankaŭ la eminentuloj ĉeestintaj ŝian edziniĝon. Kaj la magistrato de Orleano? Ni ne scias, kion pensis la honorindaj konsilantoj. Certe, depost la jaro 1436, depost la jaro, en kiu edziniĝis sinjorino d' Armŭaz, ili jam ne elsendadis heroldojn al "Johanino la Virgulino"; elspezo tamen por la funebraj mesoj daŭris pluen.

Subite, en jaro 1439, en jaro, dum kiu estis vizitinta la urbon "sinjorino Johanino d' Armŭaz", tiom meritinta dum la sieĝo de la urbo (1429), oni ĉesigis la diservon kaj renovigis ĝin nur en jaro 1450 "pro la mortinta Virgulino[1]". Tradicio de la familio dez Armŭaz asertas, ke ŝi postlasis du filojn. En jaro 1455, kiam Johanino d' Ark jam certege ne vivis, ŝia patrino kaj fratoj komencis postmortan rehonorigan proceson.

(Finota.)

M. Arco (909).

[1] Se oni povas fidi je kritikkapabloj de historiistoj el XVII-a jarcento, ekzistis tiam du dokumentoj — edziĝkontrakto de Johanino d' Ark kun Roberto dez Armŭaz, troviĝanta en domo de tiu familio en Metz, kaj vendakto de bieno farita de Johanino "du Lys" (dü Lis) Virgulino de Francio (!) en nomo de ŝia edzo. Tiuj du dokumentoj ne estas nun konataj; eble ili pereis kun multaj aliaj dum la revolucio. Ĉiuokaze tamen ili ne estas senrezerve citindaj, ĉar falsado de dokumentoj, precipe genealogiaj, okazadis tre ofte kaj metodoj de kritiko ĝis la XIX-a jarcento estis nur en embria stato.

kapablas elparoli ‘h‘. Ĉe nia stabo estas lingvista profesoro, kiu estas fakulo tiurilate; li devas scii tion.“ Ni volis kontraŭdiri, sed la oficiro ne permesis tion.

Dum tri semajnoj la rusoj salutis ĉiun germanan patrolon, kiu estis alvokita de ni, tuj per “Helmkappe“; ni ne konstatis diferencon en la parolmaniero, sed la profesoro ĉe la stabo, kiu neniam havis tempon por mem aŭdi tion, ĉiam asertis: “Absolute neeble!“ Jen — teorio kaj praktiko.

Burger (601).

EL KVINDEKJARA VIVO EN SOVAĜEJO

Mi revokas en mian memoron la tagojn de 1876, kiam mi estis metilernanto sur velŝipo, kiu ankris en Hobsongolfeto, apud la urbego Melbörn (angle: Melbourne), post vojaĝo de okdekdu tagoj de Londono.

Ni estis portantaj elmigrantojn, filojn kaj filinojn de la brita laborista klaso, kiuj, pagante unu funton sterlingan (=ĉ. 5 dol.) por la vojaĝo, havis permeson suriri la ŝipon ĉe la Orienta Hindia Doko (angle: East India) en Londono, kun la permeso de dormo sur la interaj ferdekoj. Ili vivis tie same kiel bestoj, nutrataj per pizsupo, salita ĉevalo kaj malmola manĝaĵo dum la transiro de la salakvo por laŭ la celoj de la Aŭstraliaj dungantoj de laboro, konkuri kontraŭ siaj fratoj kaj fratinoj de la laborista klaso pro vivrimedoj.

Kompreneble per gazetaj reklamoj kaj la mensogoj de elmigrintaj oficialuloj kaj agentoj ili estis plenaj da fido pri oraj oportunoj en Aŭstralio, kvazaŭa ormino por senlaboraj senmonaj britaj gelaboristoj. Malmulte ili imagis, ke ili estis veturigataj trans la oceanojn por la celo de la Aŭstraliaj patriotaj kaj bonkoraj dungantoj, kiuj uzos ilin kiel batilon por malaltigi la salajrojn ĝis la limo de mizero. Ili ne sciis, ke tiuj dungantoj amasigas armeon el malsataj laboristoj pretaj plenigi la oficejojn, fabrikojn, farmojn, la ŝafajn kaj ceterajn staciojn de la diversaj kolonioj, se la tieaj laboristoj kuraĝe plendas pri la laborkondiĉoj.

Alveno en Aŭstralio

Levante la ankrojn post kiam la veloj estis fiksitaj, la ferdekoj liberigitaj, kaj la ŝipo estis kvaranteno, ni estis trenataj al Uiljamstaŭn (Williamstown) kaj aligita al la kajo. Tie al la homaj bestoj estis permesate preni siajn malmultajn posedojn kaj paŝi sur la teron de “sia estonta lando“.

Je la sepdeka jaro de la pasinta jarcento, ŝipoj, kiuj bezonis profundan akvon, ne povis eniri la riveron Jarra-Jarra al la urbego Melbörn. Ili malŝarĝis siajn ŝarĝojn ĉe Sandriĝ (Sandridge) aŭ Uiljamstaŭn.

Dum ses semajnoj mi restis en Melbörn kaj renkontis tie kelkajn gejunulojn, kiuj dum okdek du tagoj estis loĝantoj sur la sama velŝipo kiel mi, kaj sen escepto ili rakontis la saman historieton de malfeliĉo kaj malsufiĉo de laboro, tro malaltaj salajroj por povi vivi.

La forkuro de l' ŝipo

Post du jaroj mi denove veturis, ĵetante ankron en Hobson-golfeto apud la pordego de Melbörn, post vojaĝo de naŭdek ok tagoj de Liverpul (Liverpool). Mi estis sur Glasgova ŝipo, subskribinte kontrakton kiel ordinara maristo kun la grandioza salajro de tridek ŝilingoj (ĉ $7\frac{1}{2}$ dol.) monate. Ni portis al Aŭstralio, sur la interaj ferdekoj, brute traktate kaj manĝigate en la samaj malbonaj kondiĉoj, precize la saman specon de homa ŝarĝo kiel dum la antaŭa vojaĝo. Post kvaranteno ni mallevis la ankrojn ĉe la Sandriĝ kajo, kie la laborserĉontoj en stranga lando marŝis trans ponteton kaj paŝis sur la teron de la lando de espero kaj aŭreolumo. Kun ili iris mia kofro enhavanta miajn malmultajn posedojn je vestaĵo.

Antaŭ ol pasis du semajnoj, sub la kovro de mallumo, mi forlasis la ŝipon por neniam denove returni. Por eviti areston kaj malliberon pro tiu ago mi kaŝis min en loĝejo por maristoj en Litl' Kolinz (Little Kollins)-strato' ĝis la ŝipo denove foriris trans la maron. Promenante tra la Flindersstrato, ĉe strata kruciĝo mi renkontis bone vestitan virinon. Ŝia kolorita vizaĝo rakontis la veron; ŝiaj trajtoj ŝajnis konataj al mi. Tuj ŝi rekonis min kiel maristan lernanton, kun kiu ŝi ofte parolis dum la okdekdu-taga vojaĝo de Londono al la antipodoj.

Virina malfeliĉo

Ekkriante “Hallo Fred“, ŝi prezentis sin senprokraste. Mi havis kelkajn ŝilingojn en mia poŝo; sekve mi invitis ŝin trinki tason da kafo kun mi en restoracio trans la strato. Dum la trinkado ŝi per malmultaj vortoj kun larmoj sur la vango diris al mi la saman malbonŝancan historieton kian mi ofte aŭdis en diversaj havenurboj de la globo.

Post ĉeesto en Melbörn ŝi malsukcesis trovi taŭgan laboron por sufiĉa salajro, suferis la batalon por ekzisto sub dikfingroj de tiranaj gedungantoj, ĝis ŝi ne plu povis toleri la ŝarĝon. Ŝi fariĝis loĝanto de la “Suba Mondo“ kaj certigis min, ke la plimulto da “koloritaj virinoj“ de Melbörn kaj Sidni (Sydney) estis anglaj fraŭlinoj, kiuj same kiel ŝi estis trompataj de elmigrantaj oficoj en Anglio kaj post ĉeesto en Aŭstralio devis serĉi siajn vivrimedojn sen ia subteno. Ni fintrinkis la kafon kaj iris eksteren en la straton. Mi neniam vidis ŝin denove.

Kun samsortano

Promenante rapide sur la strato, vane penante forgesi la larmojn, kiujn mi vidis sur la ruĝigitaj vangoj de mia kompatinda samlandanino, mi iris sur Burk-strato, intencante viziti vendejon. Subite mi renkontis la junulon, kiu helpis min kaŝe elŝipigi mian kofron ĉe Sandriĝ. En Anglio li estis kontoristo en asekuroficejo en Manĉestr'. Ne trovinte profitdonan oficlaboron en Melbörn, li trovis oficon kiel klient-serĉisto por pensiono. Lia devo estis renkonti vagonarojn kaj ŝipojn kaj konsentigi pasaĝerojn, ke ili loĝu en “lia“ pensiono. Mi lasis lin malbeni la agenton, kiu instigis lin forlasi Anglion.

Dume alia surprizo atendis min en Litl' Kolinz-strato. Mi reiris al la pensiono por vespermanĝi, kaj tuj kiam mi eniris en la manĝ-ĉambron, iu vokis al mi: “Ho, kunulo! de kie vi venis? Kien vi iros?“ Mi tuj rekonis la parolinton; ni unuafoje renkontiĝis en San Francisko dum 1876, kiam niaj ŝipoj ankriĝis ĉe la sama kajo. Post la vespermanĝo li informis min, ke la hieraŭan tagon li forlasis la ŝipon, sed ke post du horoj li renkontis ŝipanon, kiu diris, ke la kapitano havigis al si arest-leteron, por ke oni tenu la forestinton, ĝis la ŝipo denove pretiĝos. Sekve li forte deziris tuj forlasi la urbon. Miaj sentoj estis similaj; tial ni kune iris al la butiko de “Nia Onklo Joĉjo“, kiu montris la signon de la “tri pilkoj“ ĉe Litl' Kolinz-strato, kie ni aĉetis broke la ekipon de piediranto. Kaj antaŭ ol leviĝis la suno, ni forlasis la urbon, portante surdorse niajn pakaĵojn, direkte al Sandhörst, Kaselmen[1] kaj Ballarat, laŭ la ĉefa vojo al Eĥöka[1] kaj la rivero Möre. Piedirinte ĉ. 50 kilometrojn ĝis la subiro de la suno, niaj piedoj lacaj kaj vezikaj, ni atingis braketon de la rivero, kaj proksime, ĉe aro de gumarboj, ni renkontis alian vagulon, kiu ĵus pretigis sian vespermanĝon. Li estis germano, kiu pro longa restado en la lando bone parolis la anglan lingvon. Li invitis nin al sia fajro, kaj baldaŭ varmega teo helpis nin manĝi tion, kion ni aĉetis en urbeto survoje. Post la manĝo ni interparoladis kun nia nova amiko, kaj antaŭ ol enlitiĝi ni estis bonaj kamaradoj.

(Finota.)

Maljunulo (10664), Anglio.

[1] Angle: Sandhurst, Castlemaine, Echuca, Murray.

Jam mendebla kaj baldaŭ ricevebla:

KANDID

la ĉefverko de

VOLTER

en esperanta traduko de E. Lanti

kun antaŭparolo

de la tradukinto kaj ilustroj de

R. Bartelmes

160 paĝoj. Prezo: ***1,70*** *mk. g.*

SENNACIULA VIRINA PAĜO

Sub la kontrolo de Virina Sekcio de SAT. — Red. Adreso: Elma Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.

NIA FEMINISMO

Nuntempe, kiam la porvivada lukto estas tiel akra kaj peniga, en nia putriĝanta kaj egoista socio, kie ĉiu nepre celas superregi la aliajn, la virino — la ĉiama oferitaĵo—energie postulas sian rajtolokon tiel same en la familio, kiel en la socio. Ŝi depostulas rajtojn, kiujn ĉiam la viroj rifuzis al ŝi...

Ĉu tio signifas, ke postulante tiujn rajtojn, la feminisma virino kontraŭas la viron kaj agas milite kontraŭ lin? Ĉu siavice la virino celas superregi la viron? Ne. Por ni feminismo ne signifas batali kontraŭ la viron; ĝi ankaŭ ne estas interseksa batalo. Ni ne malamiketas niajn virajn K-dojn, sed ĉar la virino laŭ socia vidpunkto estas samvalora, kia estas la viro, ni ne volas submetiĝi je lia rego. Ni ne konsentas — pro maljustaj leĝoj kaj kutimoj esti kvazaŭ akcesoraĵo.

Longe kaj penige batalinte, ni fine sukcesis egaligi nian salajron al tiu de la viroj[1]. Sed ni volas ekvilibrigi rajtojn kaj devojn, penojn kaj plezurojn.

Nia tro frue mortinta K-dino Neli Rusel (Nelly Roussel) skribis: "Feminismo estas harmonieca doktrino; ĝi celas kunigi la homan paron laŭ la spirito kaj koro, kaj ne nur laŭ la sekso kaj intereso. La homa paro devas konsisti el du unuoj konsciaj kaj liberaj, sin reciproke respektante, konsilante kaj helpante. Ambaŭ unuoj, koro ĉe koro, mano ĉe mano, sen hierarkio, sen ĵaluzo, devas konstante celadi al pli da amo kaj pli da belo." Oni el tio konstatas, ke se la signalvorto de feminismo estas "batalo", ĝi ankaŭ estas "amo".

La sindikatisma feminismo, kiu stimulas la propagandistinojn de la feminismaj grupoj ĉe la publika Instruado en Francio, ne nur celas socian pliperfektigon, ĝi ankaŭ celas profesian kaj pedagogian plibonigon.

Je profesia vidpunkto ni jam atingis salajregalecon[1], sed ni volas, ke la rajtoj ankaŭ estu samaj por ĉiuj ŝtatoficistoj, ne atentante pri la sekso. Tial ni senlace postulas: 1. ke la pensio de mortinta oficistino estu pagata al la vidvo kaj infanoj; 2. ke la kromsalajraj monhelpoj estu por ĉiuj egalaj; 3. ke la pronaska libertempo estu plilongigata, por ke la patrino povu mamnutri la ĵusnaskiton; 4. ke la depostuloj de la geoficistoj — dum la ofica provtempo — estu realigataj; 5. ke ĉi tiuj, kiuj oficas en loko, kie la vivado estas ĉiel malfacila, ricevu ŝtatan monhelpon.

Laŭ pedagogia vidpunkto ni batalas kontraŭ la nuna disigo de la seksoj; ni postulpetas, ke la geseksuloj estu kunedukataj en ĉiuj gradoj de la instruado, ĉar ni opinias, ke tio plifaciligus spiritan interŝanĝon kaj ebligus, ke la disvolviĝo de la homa estaĵo estu pli harmonia.

En niaj lernej-klasoj ni studis la demandon rilate la infanojn tro nervemajn, kaj ni elserĉas, kiarimede estos eble malaperigi ilian tronervemon, por ke ili fariĝu estaĵoj bonsanaj kaj normalaj.

Ni plie petas, ke la kuracista senpaga vizito okazu akurate en ĉiuj lernejoj. Niaj grupoj de la instruada fako agas ne nur profesi- kaj pedagogicele. Ili ja transpasis la limojn de nia profesio kaj atentas pri la sorto de ĉiuj virinoj, patrinoj kaj laboristinoj.

Mario B. kaj Suzano D.

Laŭ "Bulteno de Feministaj Laik-Instruadaj Grupoj" en Francio mallongigite trad. SAT-anino 1380

[1] Oni rimarku, ke en plej multaj landoj tia egaligo ne estas atingita. La artikolo verkiĝis en Francio. — Red.

Al K-dino Tereso Cabo (SAT-anino 8163)

Kamaradino!

Al vi, ho kamaradino,
Mi sendas saluton sinceran;
Al vi, la estonta patrino,
Sentima en lukt' pro libero.

Se vian amatan filon
Sen antaŭjuĝ' vi edukos,
Ne kreos el li vi ludilon,
Batalon li mem ne rifuzos.

Per viaj saĝaj admonoj
Ne logos lin dogmo kaj kult',
Pastroj, diaĵoj, friponoj,
Atakos lin sen rezult'.

Kiam vin, ho nobla patrino,
Via filo amkaresos,
Vi fieros, pro via destino,
Ĉar via idealo sukcesos.

Ĉar tiu sango el via kor'
Batalas, vivas kaj amas;
Kaj konstanta dolĉa memor'
En li ekbrilas kaj flamas.

Al vi, ho kamaradino,
Mi sendas saluton sinceran,
Al vi, kunlaborantino,
En la klasbatal' pro l' libero!

J. Grau (12028).

JAPANAJ LABORISTINOJ

La virinloĝantaro en Japanio	ĉ. 27 897 000 homoj
(la nombro estas duono de la tuta loĝantaro)	
Laboristinoj	8 127 000
Virinoj, kiuj sin okupas pri instruado kaj aliaj spiritaj laboroj .	170 000
Mastrinoj de komercaj kaj terkulturaj okupoj	1 620 000
Virinoj, kiuj vivadas je domluprezo, rento, emeritaĵo, dividendo, pensio	220 000
Virinoj vivantaj depende de viroj kaj laborantaj hejme	5 364 000

La restanta nombro apartenas al tiuj, kiuj estas pli ol 60-jaraj aŭ malpli ol 16-jaraj.

Specoj de Laboro

8 127 000 da laboristinoj sin okupas pri terkulturo, industrio, komerco, ofica servo, liberokupo, mino, komuniko kaj akvoproduktado. Laboristinoj en industrio faras nombron da 1 200 000, el kiuj 800 000 sin okupas pri tinktura-industrio; 60 000 pri scienca industrio; aliaj pri industrio de maŝinoj kaj iloj, en ĉiuj branĉoj de diversaj industrioj.

Labor-kondiĉo kaj labortempo

28 elcentoj da laboristinoj laboras 9—10 horojn ĉiutage: 53 elcentoj (t. e. pli ol la duono de la tuta laboristinaro) laboras 10—12 horojn ĉiutage. En tinktura industrio, en kiu pli multe da virinoj ol viroj estas okupataj, la labortago estas 12-horaj, kaj pli ol 200 mil laboristinoj laboras dum nokto; oni kalkulas 7% aŭ 8% da noktlaboristinoj en Japanio.

Laborpago

Virinoj, nur pro tio ke ili estas virinoj, ne povas akiri la saman pagon por la tute sama laboro kiel viroj. Ekzemple en la metalindustrio, virlaboristoj akiras 1.25 dol., dum virinlaboristoj nur 0.60 dol.; en fibro-industrio, viroj akiras 1.20 dol., kaj virinoj 0.46 dol., en ĥemia industrio, viroj akiras ĉ. 1 dolaron, dum virinoj 0.44 dol. Sekve la plej multo da virinlaboristoj ĉiutage laboras pli ol 10 horojn kaj akiras pagon malpli altan ol ½ dolaron.

Pensionoj

46 elcentoj da gelaboristoj en fabrikoj, sub la apliko de fabrikleĝo, loĝas en pensionoj, kaj pli ol 8% el tiuj en pensionoj loĝigitaj personoj estas laboristinoj, kiuj nombriĝas je pli ol 480 400. Tag-laboristinoj kaj nokt-laboristinoj loĝas en unu ĉambro; ili alterne uzas unu saman ĉambron tage kaj nokte, kaj ĉ. 10 laboristinoj loĝas en ĉambro, kiu estas proks. 3 metrojn larĝa kaj 4 metrojn longa. Manĝaĵoj kaj litaĵaro estas tre malbonaj: nehigieneco regas: pensionloĝantinoj ne havas liberon por eliri.

Per tio virinlaboristoj laboras tute same kiel virlaboristoj: Sed virinlaboristoj ne havas politikan rajton por elektado, nek liberon por aliĝo al politika partio, kaj la civitana leĝo donas al virino tute malegalan trakton.

Kompare kun riĉulo, kompare kun viro, ho, en kiel diferenca stato japana virino troviĝas? Ŝi ja suferas sub duobla subpremego!

Eljapanigis 4976.

En katenoj de la maljusteco

Virina Krestomatieto

40 paĝoj. Prezo: 0,60 mk. g.

Havebla ĉe la Administracio de SAT,
Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).

TRA ESPERANTIO

INTER NI

— Mia embaraso estas granda por elekti inter la kandidatoj por la ĝenerala voĉdonado. Vere, mi ne scias kion fari.

— Bone mi komprenas vian embarason, tial ke la saman mi spertis. Tamen ne tro longe mi ŝanceliĝis k konkludis: "La nomoj de tiuj kandidatoj estas publikigitaj en Sennaciulo k neniu skribis al la Direkcio de SAT, ke ĉi tiu aŭ tiu estas fripono, aŭ sentaŭgulo. Sekve ĉu mi bezonas rompi al mi la kapon por fari elekton? Se mi ne konas persone ĉiujn kandidatojn, mi tamen povas havi pri kelkaj firman opinion.

"Jen K-do A, kiu ofte kunlaboris al Sennaciulo k al La Nova Epoko; per liaj saĝaj artikoloj mi povis akiri konvinkon pri lia gvidkapablo. Jen K-do B, kiu plurfoje starigis saĝajn proponojn aŭ demandojn dum kongresoj aŭ aliokaze; jen K-do C, kiu estas bone konata kiel fervora pioniro de nia movado en sia urbo k okupas postenon ĉe sialanda LEA; jen K-do Ĉ, kun kiu mi korespondadis; jen . . ." sed mi ne plilongigu ĉi tiun skribon.

Devas esti klare al ĉiu, ke en SAT estas eble akiri konvinkon pri la elektindeco de kandidato, kiun oni neniam vidis, neniam aŭdis. Sed kompreneble, necesas por tio esti SAT-ano jam de kelka tempo, necesas aboni Sennaciulo-n, unuvorte necesas esti vere aktiva membro de la Asocio.

— Nu, ĉu do la novuloj ne devas ankaŭ voĉdoni?

— Kial ne? Ili povas peti konsilon al la peranto aŭ al la gvidanto de la SAT-rondo. Ne ekzistas do principe ia ajn malhelpo en la funkciado de nia ĝenerala voĉdonado.

Mi tiel rezonis kun nove varbita SAT-ano, kiam alvenis mia malnova amiko G. Li havis malkontentan mienon k tenis pugne la manojn. Li ekdiris:

— Ci konas "K-don" F.

— Certe jes; almenaŭ mi kelkfoje aŭdis k aplaŭdis lin en kunvenoj. Nu?

— La aĉulo! Ni ektrovis, ke li estas spiono. Li cetere malaperis de kelkaj tagoj . . .

— Tio estas relative ofta fakto. Kaj vidu, cia sciigo helpas al mi klarigi al tiu ĉi nova SAT-ano, ke ne ĉiam sufiĉas koni iun persone por esti tute certa pri lia fidindeco.

En SAT la konsilantoj ne ricevas salajron k sekve estas dube, ĉu friponoj avidas tian postenon. Tial ni do povas sen granda hezito voĉdoni por kandidatoj, kiujn ni tute ne konas.

Cetere, kiam la SAT-movado estos pli maljuna, pli vaste etendiĝanta, oni pli k pli havos la eblon koni la kandidatojn.

Sufiĉas nun, ke ni estu konvinkitaj, ke la principo de voĉdonado en SAT estas taŭga. En la estonto ni zorgos pliboniĝi ĝian praktikan aplikadon. Dume sen timo ni voĉdonu iom blindete, rilate al kelkaj nekonatuloj. Ni estu trankvilaj, pro tio certe ne domaĝos nia afero. E. L.

Laborplano
dum la 9-a SAT-Kongreso

Servado en la stacidomo:

sabaton, la 3-an de aŭgusto, de 7-a ĝis 24-a horo; dimanĉon, la 4-an de aŭgusto, de 6-a ĝis 16-a horo. Post tiu tempo la akceptejo dum tuta daŭro de la Kongreso funkcios en la Popoldomo (Volkshaus — parolu: Folkshaŭs), atingebla per tramoj 10, 11, 28 (informoj pri tramveturado en Leipzig aperos en "S-ulo" post kelkaj semajnoj).

Dimanĉon, la 4-an de aŭgusto:

je 9-a horo kunsido de la plivasta estraro de LEA por germanlingvaj regionoj en la Popoldomo:
je 9-a horo renkontiĝo en la Popoldomo por komuna vizito al la zoologia ĝardeno k. a.;
je 12-a horo komuna manĝado en la Popoldomo;
je 14-a horo kunsido de la Plenumkomitato k SAT-Konsilantoj en la Popoldomo;
je 16-a horo komuna fotado en la Popoldomo;
je 17-a horo kunesto de ĉiuj Ge-k-doj en la ĝardeno de la Popoldomo (tamburado, muzikado, alarmado por la amaskunveno);
je 18-a horo amaskunveno en la salonegoj de la Popoldomo.

Lundon, la 5-an de aŭgusto:

je 8-a horo renkontiĝo en la Popoldomo por vizito al ĉefproduktejo k buĉejo de la konsumkooperativo;
je 9-a horo kunsido de labkoroj, ĵurnalistoj, gazetraportistoj, fotoamatoroj k. a. gazetkunlaborantoj;
je 10-a horo renkontiĝo en la Popoldomo por komuna aŭtoveturo tra la urbo;
je 12-a horo komuna manĝado en la Popoldomo;
je 14-a horo unua laborkunsido (konsistiĝo de la kongresa estraro k komisionoj);
je 16-a horo sindikataj fakkunsidoj laŭ industrigrupoj en la Popoldomo;
je 19-a horo Internacia Proleta Altlernejo — parolado pri "Imperialismo k militoj";
je 20.30-a horo lumbildparolado de K-do Pech-Plzen pri sia "vojaĝo tra Eŭropo k Afriko per esperanto".

Mardon, la 6-an de aŭgusto:

je 8-a horo dua laborkunsido (raportoj de la Plenumkomitato);
je 12-a horo komuna manĝado en la Popoldomo;
je 14-a horo tria laborkunsido (fino de raportoj k diskutado);
je 17-a horo Internacia Proleta Altlernejo — parolado pri "lingvoscienco k mondlingva problemo";
je 19-a horo kunsido de sportuloj, gimnastuloj k naturamikoj en la "laborista gimnast- k sportlernejo" (komuna formarŝo de la Popoldomo je 18.30-a horo);
je 19-a horo kunsido de virinoj en la Popoldomo;
je 19-a horo kunsido de reprezentantoj de LEA-oj en la Popoldomo;

Merkredon, la 7-an de aŭgusto:

je 8-a horo kvara laborkunsido;
je 12-a horo komuna manĝado en la Popoldomo;
je 14-a horo kvina laborkunsido;
je 17-a horo Internacia Proleta Altlernejo — parolado de K-do Koppisch-Leipzig (estrarano de la laborista gimnast- k sportasocio) pri "sporto en la servo de la Proletaro";
je 19-a horo kunsido de la junularo en la Popoldomo;
je 19-a horo kunsido de la liberpensuloj (ateistoj, sendiuloj k. a.) en la Popoldomo.

Ĵaŭdon, la 8-an de aŭgusto:

je 8-a horo sesa laborkunsido (lasta);
je 12-a horo komuna manĝado en la Popoldomo;
je 14-a horo kunsidoj de partianoj aparte laŭ partioj en la Popoldomo;
je 14-a horo renkontiĝo de nepartianoj en la Popoldomo por komuna aŭtoveturo, vizito al zoologia ĝardeno, banejo k. a.;
je 18-a horo Internacia Proleta Altlernejo — parolado de bulgara K-do pri "la laborista movado en la blanka terorlando Bulgario";
je 19.30-a horo Interamika Vespero en la granda salonego de la Popoldomo (enkonduke estos montrata filmo de la 2-a laborista gimnast- k sportfesto okazonta semajnon antaŭ la SAT-Kongreso en Nürnberg).

Vendredon, la 9-an de aŭgusto:

je 8-a horo renkontiĝo en la Popoldomo por komuna vizito al la ĉefproduktejo k buĉejo de la konsumkooperativo;
je 10-a horo renkontiĝo en la Popoldomo por komuna promenado;
je 12-a horo komuna manĝado en la Popoldomo;
je 13.30-a horo renkontiĝo en la ĉefstacidomo por adiaŭo de la Gek-doj

partoprenontaj la postkongresajn ekskursojn;
je 17-a horo renkontiĝo en la Popoldomo por komuna promenado tra la urbo, vizito al banejo k. a.

Ĉiuj renkontiĝoj en la Popoldomo okazos en la ĝardeno. Renkontiĝo en la stacidomo en la dekstra (orienta) halo malsupre.

Proponoj pro pluaj fakkunsidoj ne jam entenitaj en la laborplano estas senprokraste anoncendaj kun definitiva tago k horo (laŭ tiu laborplano) al K-do F. C. Richter, Lochmannstr. 2, III, Leipzig O 27 (Germanio).

ĈU ESPERANTO UTILAS AL LA PROLETARO?

Ĉiuj memoras la debaton, kiu okazis antaŭ nelonge, kiam ni aperigis la eldirojn de K-dino Uljanova pri esp-o. Niaj legantoj observis kun plej arda intereso, kiel personoj ludantaj gvidrolon en la laborista movado, reagas je la fakto, ke esp-o pli kaj pli penetras en la socian vivon. Ankaŭ la sekvantaj linioj sendube estos legataj kun granda intereso. Red.

Responde al artikolo de M. Uljanova: "Ĉu alilandaj lingvoj aŭ esp-o" (vd. "S-ulo", n-o 224), la redakcio "Raboĉe-Krestjanskij Korrespondent" ricevis multajn leterojn el diversaj landoj. En tiu gazeto (n-oj 7/8, aprilo 1929) aperis kvinpaĝa artikolo de K-do D. Iĥok: "Ĉu por aŭ kontraŭ esp-o?" kun du pri-esp-aj kliŝoj. Jen estas ekstraktoj el la artikolo de Iĥok koncernantaj esp-on:

"Montri esp-on kiel ilon interliganta laboristajn amasojn de diversaj landoj. ĉefe akcenti gravecon de esp. studado, kiel pri ilo kvazaŭ kondukanta al liberigo de l' homaro el kapitalista jugo, — ĝi estas finfine la plej malutila formo de ŝmirado (= mis-klarigado) pri klasbatalo, t. e. de tiu fundamento, kiu akcelas kreskon kaj plifirmigon de internacia solidareco proleta, preparon de batalo por proleta diktatoreco, kiel sola premiso por kreo de komunisma socio."

"Leteroj, kiujn ni ricevis de pledantoj por esp-o, montras, ke rusaj K-doj tiom fervorege laŭdantaj esp-on mem studis tiun aŭ alian alilandan lingvon kaj parte estas sciantaj ĝin. Ne estas hazardo, ke granda kvanto da leteroj ricevitaj el USSR plede por esp-o apartenas al plumo de instruistoj. Same ne estas hazardo, ke de "simplaj" lab. esp-istoj ni ricevis leterojn nur el eksterlando: Germanio, Anglio kaj Hispanio; germana, angla kaj hispana lingvoj estas pli proksimaj al esp-o, kaj tial simplaj laboristoj povas ĝin pli facile ellerni en Eŭropo. Al simpla laboristo en Sovetio estas pli malfacile ellerni esp-on."

"Meti artefaritajn barojn sur vojo al studado de fremdaj lingvoj; agitadi por esp-o, artefarita lingvo, posedanta laŭ konfeso de l' pledantoj mem treege malmultan literaturon, signifas alporti ne utilon, sed malutilon al la laborista movado."

En parto de sia artikolo K-do Iĥok ne skribas kontraŭ utiligado de esp-o:

"Ni ne neas kelkan servan rolon de esp-o en afero pri plifirmigo de internacia interligo. Ni estas fidelaj al doktrino de Lenin, kiu postulis, ke ni konsideru kaj mem gvidu ĉiujn organizojn, en kies vicoj estas laboristoj."

"K-do Didrikal en siaj rememoroj pri Lenin (v. "Molodaja Gvardija" n-oj 2/3 por 1924) komunikas jenan interesan opinion de Lenin en 1913 pri esp-o: 'Revoj pri artefarita kreo de sola internacia lingvo, ia 'esperanto' aŭ 'volapük' estas utopio. Ne artefarite estos kreita lingvo de estonta socio. La problemo pri la lingvo povos esti solvita en unu el du specoj. Aŭ fariĝos universala por ĉiuj popoloj unu el la lingvoj de grandaj kulturaj nacioj: angla, germana, franca kaj eble rusa. Aŭ ĉiuj popoloj elstudos tri-kvar lingvojn kaj posedas ilin."

"Ni devas atenti en nia ĉiutaga praktika laboro, ke nia celo estas serĉado de rimedoj por plifortigi interligon kun diversaj taĉmentoj de internacia proletaro. Bazante nin je tiu ĉi vidpunkto, ni ne batalas kontraŭ esp-o, agnoskante ĝin kiel unu el iloj por interligo. Sed ankaŭ ni konsideras, ke nia ĉefa, nia fundamenta tasko estas agitadi por studado de fremdaj lingvoj."


"Ni konsideras tre erara, kiam K-doj, precipe en la provinco, irante sur vojo al plimalgranda kontraŭstaro, enpresas abunde peresp-ajn leterojn, aliigante fakon de internacia laborista interligo en tiun por reklamado pri esp-o ("Niĵegorodskaja Komuna", Irkutska "Vlastj Truda", "Krasnij Krim" k. c.)."

"Ni celas ne fuŝi, sed konservi lingvon de sovetia laboristo en niaj ĵurnaloj, des pli malmultajn kaŭzojn ni havas por senkolorigi lingvon de eksterlanda laboristo. Nia sperto montras, ke duon-analfabeta artikolo de skota labkor'o, verkita en malfacile tradukebla lingvo, rafinita per 'simplapopolaj' vortaĉoj, estas pli flama, konvinka ol senpersonigita, supersfera kaj eksterplaneda formo de esp-o, kies malriĉecon kompare kun fremdaj lingvoj neniu povas nei. Certe en pluraj urboj povas troviĝi sufiĉa nombro da esp-istoj, kiuj povos plenigi mizerajn angulojn de internaci-koresponda fako. Sed tiel agi signifus en plej bona okazo agitadi por margarino anstataŭ butero. Ni estas kontraŭ subŝanĝo de internacia laborista interligo per korespondado de amatoroj-esp-istoj."

Esp-igis A. Sidorov (5458).
Rostov/Don.

15-a Jarkunveno de Hungaria Esperantista Societo Laborista

La 12-an de majo, tuttage, okazis la Jarkunveno de H. E. S. L. en sia nova ejo, konsistanta el du kontorĉambroj k unu salono en la centro de la urbo. La kunvenon partoprenis 75 delegitoj, reprezentinte 11 budapestajn k 12 provincajn grupojn. La lab. esp. movado, malgraŭ grandaj malfaciloj, prosperas. Estas karakterize por la situacio en Hungario, ke kursojn oni malpermesas per la motivo, ke "la laboristoj unue lernu hungare", funkcion de grupoj ne permesas dirante, ke "la plejparto de la membroj estas ekstreme pensantaj laboristoj, kies grupiĝo en societon povus sekvigi tion, ke ili ekpraktikos la eksterlandajn politikajn rilatojn" k fine, ke la Jarkunvenon ĉeestis i. a. la delegito de la polico kun policoficiro k du policanoj.



...Estas tre malfacile labori precipe en provinco sub la plej akra subpremo politika, ekonomia k kultura; tamen estis neeble sufoki la lab. esp. movadon, kio estas videbla el la raportoj. Tio en plej granda parto estas ŝuldata al la simpatio de la lab. amasoj, al la energia laborado de la societo k ne laste al la ĝenerala — sed ne senescepta helpo de la socialdemokrataj partio k sindikatoj. Plej bone montras tiun helpon la fakto, ke dum la lastaj du semajnoj en la lab. gazetoj 7 priesp-aj artikoloj aperis, inter ili 3 en la tagĵurnalo.

El la raportoj estas videble, ke pasintjare fondiĝis du novaj grupoj, du aliajn la polico malpermesis. La societo havis 1. 1. 1929 1300 membrojn k en 1928 615 aliĝoj okazis. En la 86 aranĝitaj kursoj eklernis 1405 lernantoj, el kiuj tamen nur 365 restis ĝis la fino. La societo eldonis al sia gramatiko — kiu vendiĝis en 1928 en 2000 ekzempleroj — instrukciaron por la instruantoj, aranĝis leterkurson k okazigis superan seminarion en Budapest k ankaŭ en provincaj urboj. La bibliotekoj de la societo havis 2153 librojn, kiujn la membroj uzis 1343-foje. El la membroj la lingvon parolas 700 K-doj.

La societo eldonis pasintjare 20 000 flugfoliojn, aranĝis ekspozician materialon disponigeblan al ĉiuj grupoj k tre bone uzitan. Estis eldonataj ankaŭ grandaj bildafiŝoj per linoleuma preso. Por pruvi la praktikan utiligeblon de esp-o, la societo aranĝis kolektivan ekskurson al Wien, kiun partoprenis 35 K-doj k ĉe kiu ni povis sperti la veran helppretecon de niaj K-doj. Ni sukcesis presigi la gazetservon de la Lab. Soc. Sportinternacio en "Népszava". La naturamikaj membroj de la societo portis la problemon de esp-o al la internacia kongreso k konstruis espfonton k Zamenhof-kabanon en la montaro de Buda. Bone helpos la propagandon la nun aperanta propaganda broŝuro.

La grupoj aranĝis ĉiusemajne prezentojn k grupvesperojn, kiuj ĝenerale estis bone vizitataj. Anstataŭ la ĉesinta gazeto "Munkáskultura" la societo eldonis de pasinta aŭgusto per multobliga aparato preparitan "Antaŭen".

La financojn de la societo multe helpis la regule ricevata urba subvencio de

P. 1200[1] jare de la urbo Budapest k la librovendejo de la societo, kiu subtenis la administran konton (salajro de oficisto) per 3080 pengoj, la bibliotekojn de la societo per 350 k la propag. konton per 200 pengoj. La tuta monspezo en la centro estis (en 1928) ĉ. 15 000 pengoj. La amplekson de la administra laboro montras la ekspeditaj 1444 leteroj k poŝtkartoj, 361 pakaĵoj k 1456 cirkuleroj.

La Jarkunvenon ĉeestis delegito de la soc. dem. partio: parlamentano K-do Vancák J., delegitoj de la ĵurnalo "Népszava", Sindikato de ferlaboristoj, tiu de barbiroj, kelkaj kultursocietoj, aliaj sendis sian saluton perletere. La raportoj k diskuto pri ili plenigis la antaŭtagmezon, dum posttagmeze sekvis la elekto de l' gvidantaro k la proponoj. Kontraŭ 22 voĉoj estis reelektata la malnova gvidantaro kun ioma ŝanĝo.

H. E. S. L. Centro, Budapest.

Proponoj al la 9-a Kongreso

(Daŭrigo)

5.

Mi proponas, ke estu fondata filatelista paĝo en "S-ulo", laŭ ekzemplo de scienc-kultura aŭ sporta paĝoj. Ĝi havu kiel celon, science prilabori k klarigi apartajn problemojn pri filatelio, larĝan popularigon de filatelistaj ideoj k klarigon de ĝia aplika signifo en scienca, pedagogia, estetika k ekonomia rilatoj, potencigon de filatelio inter SAT-anoj. Mi estus preta redakti la Paĝon.

V. Fedorovski (13 059).

RADIO-INFORMOJ

Respondoj pri la dissendoj el Moskvo

En Radio-rubriko (n-o 239) iu K-do demandis pri esp. sendoj de l' stacio je nomo Komintern. Mi respondas:

1. Jam de longa tempo la Internacio post la 12 sonorbatoj el Spasska Turo ne estas ludata. 2. Esp.-radio-koncerto, kiu devis okazi 21. I. 29, okazis dimanĉe 20. 1. 29. Sed ial la anonco pri tempŝanĝo aperis nur en sovetiaj gazetoj. (Ĉu ankoraŭ ie?) 3. Ankaŭ de kelka tempo esp.-lecionoj ne plu estas elsendataj.

La stacio, elsendanta anglalingvan kurson, aŭditan de K-do G. P. de Bruin, estas verŝajne Komintern, kiu depost la jarkomenco elsendas germanan kaj anglan kurson. N. A.-c.

Ŝanĝo de dissendo-horoj

Pro organizaj kaŭzoj estas ŝanĝitaj horoj de niaj radio-dissendoj en esp-o, anoncitaj antaŭe. La dissendoj (politika informado pri USSR) okazas do (kiel jam konate, dimanĉe, per la ondo 1680 m) je la 20.30 h. MET. Aŭskultu nin kaj skribu pri aŭdebleco! — Tutukrainia Administracio por Radio-telefonio. (5221)

Pri la dissendoj ĉe VARA (Nederlando)

Esp. sciigoj baldaŭ estos disaŭdigataj ĉiudimanĉe de VARA (Unuiĝo de lab. radio-amatoroj). Ni jam antaŭe petas sendi al ni sciigojn indajn kaj uzeblajn por konigi al la esp-istaro atingebla el la urbo Hilversum en Nederlando. Post la disaŭdigoj ni bezonas raportojn pri la elsendo, ĉar la estraro de la nomita unuiĝo ĝenerale estas kontraŭesp-a. Sciigojn ktp. oni sendu ĉiam al K-do F. Faulhaber, Marathonweg 15, II, Amsterdam (Z), Holando.

KIU KULPAS

Interesa fakto okazis antaŭ nelonge en nia urbo Rtiŝĉevo (Sovetio) ĉe mezlernejo (dua ŝtupo), kie la germana lingvo estas deviga lernobjekto. Ĝin instruas maljuna instruistino, kiu krom devigaj studokupoj inter lernantoj organizis ĉe la lernejo rondeton por plialtigo kaj praktikado de l' scipovo en germana lingvo. La instruistino enradikigas al la lernantoj sovetian devizon: "Naciajn lingvojn en amasojn." Ĉefa celo de la rondeto estas: organizi kaj komenci "internacian" korespondadon en nomo de l' tuta lernejo.

La rondeto ricevas kelkajn germanajn ĵurnalojn, en kiuj oni trovas adresojn de kelkaj revoluciaj redakcioj en eksterlando. La rondeto antaŭ kelka tempo jam sendis leterojn al Germanio (respondo ankoraŭ ne estas ricevita). Necesas diri, ke la instruistino mem tre malfavoras al esp-o kaj al ĉiuj rekomendas studi nur germanan lingvon (kompreneble kial...?). Al esp.-interesiĝantoj ŝi diras simple: "Lerni esp-on, signifas kaptadi fiŝon en marĉo." Samtempe en la urbo ĉe vespera lernejo de plenkreskuloj ekzistas esp-ista rondeto, kiu sufiĉe bone organizis kaj jam praktikas internacian koresp-adon kun kelkaj landoj: Germanio (Sebnitz), Francio (Saint-Trojan), k. a. Pri tiu ĉi koresp-ado sciiĝis lernantoj de l' germana instruistino. Ĉar la germanlingva rondeto ne deziris limigi sin en internaci-skala koresp., ĝi petis sian gvidantinon organizi korespondadon kun kelkaj landoj laŭ esp.-rondeta ekzemplo. Ŝi promesis skribi al Francio, ĉar ŝi laŭdire komprenas iom francan lingvon. Mankis francia adreso, kaj skribi estis neeble. Laŭ peto de l' rondetanoj la instruistino sendis K-dinon al esp. rondeto por preni adreson. La esp. rondeto donis la deziritan adreson al la delegitino kaj rekomendis al ŝi korespondi kun ĉiuj landoj pere de l' esp. rondeto, skribante en nomo de la germ. rondeto. Ŝi konsentis kaj skribis kolektivajn leterojn en Germanion, Francion, Anglion, redaktitajn en esp-o. La instruistino ekkoleris kaj ne sendis Francion. La ricevitaj leteroj estis laŭtlegataj al la tuta lernantaro kaj unu enpresata murgazeton.

Per tiu esp. koresp-ado alia instruistino (de socia fako) interesiĝis kaj komencis helpi al la iniciatintoj. Ŝi favore rilatas al esp. koresp-ado kaj provas organizi por la lernjaro 1930 ĉe la lernejo esp. studadon. Ŝi mem lernos esp-on somere ĉe la vesperlernejo. La komenciĝinta "internacia" koresp-ado en germ. lingvo fiaskis. La gvidantino-instruistino komencis nerviĝi kaj klaĉadi ĉe la lernejа estraro, ke esp-istoj subfosas "internacian" koresp-adon kaj eĉ lernejajn studojn de germ. lingvo ktp.

La lernantaro mem kontraŭagis la blufon: antaŭ kelkaj tagoj ĉe l' lernejo organiziĝis speciala komisiono por intern. koresp. sub gvido de l' instruistino de la socia fako. La esp. rondeto ĉe l' vespera lernejo priservas tiun komisionon.

Nu, kiu kulpas en tiu nefunkciado de l' germanlingva koresp-ado? Ĉu estas la esp-istoj, kiel diras la kolerema instruistino? Ne, estas ŝi mem pro sia nekomprenemo, ke ŝia koresp-ado ne estas vere internacia, sed nur naciskala. (2769)

Atentigo!

Tro malmultaj K-doj atentas pri nia decido enmeti en "S-ulo" fotojn de grupoj, manifestacioj ktp., sed kondiĉe ke la sendantoj (individuoj, grupoj aŭ organizoj) pagu la elspezon por la kliŝigo de l' uzotaj fotoj. Pro la multekosteco de la kliŝoj (k entute de la 12-paĝa gazeto) al ni ne estas eble pagi la kostojn ankaŭ por tiaj fotoj, kiuj havas pli malpli person-interesan karakteron. Tiaj kliŝoj kostas 10 mk. g. Kompreneble oni povas liveri ankaŭ la pretan kliŝon (se ĝi ne superas larĝon de 10,5 cm). Ĉiuokaze la kliŝoj apartenas al la paginto post apero en la gazeto. Oni notu tion! — Red.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

SOVETIO. Leningrad. Pro somera proksimiĝo la kursa vivo iom post iom plimalgrandiĝas. Sed ĉi tieaj esp-istoj havos dum sumero okazon renkonti div. esp. aŭ ĝenerale laboristajn delegitarojn k kolektivojn vojaĝantajn en Sovetion. Dum vintra sezono nia urbo posedis 54 grupojn, kies partoprenantoj estis 630 pers. Somere oni praktike aplikos parole rezultojn de l' studado. Lernfako de l' SEU-organizo loka disponas pri 38 esp. instruantoj. La lastaj estas kvalifikitaj de speciala ekzamena komisiono. De aŭtuno kelkaj lernejoj enkondukos esp-on kiel nedevigan studobjekton. La universitato intencas aranĝi specialan esp. lingvan katedron. Sekve ni havos instruistojn por superaj lernejoj, t. e. privat-docentojn. Speciala propagando inter Baltmaristoj estas antaŭvidita. (S. F. K.) — **Krivo-Rog.** La ĉiutaga ĵurnalo "Červonij Kirnik" enpresis pri- k peresp. materialon. Estas organizita intersindikata esp. konsultejo, kiun priservas speciale salajrata K-do (salajro monata: 75 rubloj). Por junkom-istoj k IRH-aktivularo estas organizita 5-monata seminario por prepari laborantojn por internacia interligo. La lekciantoj estas salajrataj. (M. R.) — **Rostov.** 1-an k 2-an de majo okazis 2-a Nordkaŭkazlanda esp. konferenco, kiun partoprenis 38 delegitoj el 16 lokoj nordkaŭkazaj k multaj esp-istoj kun konsilrajtaj voĉoj. Inter ili estis 24 SAT-anoj. Oni konstatis sukcesplenan laboron de l' Komitato rilate al priservado de ruslingvaj ĵurn. per esp. materialo. Oni rekomendis al ĉiuj SEU-anoj aliĝi al SAT. (5458.) —

[1] 100 pengoj = ĉ. 14 dolaroj.

NIA POŜTO

13 059. — "S-ulo" ne estas "indiferenta" pri filmoj, sed ĝia Redakcio ne disponas specialajn raportantojn pri tiu temo. Sekve ni ne povas enmeti materialon, kiun ni ne posedas. — Pri "idismo" estas preferinde silenti; ni ne okupiĝu pri kadavro. — E. L.

11 567. — Se per anoncoj en "S-ulo", ekzemple, ĉina SAT-ano edziĝus kun franca SAT-anino, mi ne konsiderus la fakton malgrava; mi vidus en tio plian motivon por pravigi la ekziston de nia Asocio. Pri la feliĉo de la geedzoj ni ne parolu: mi konsideras la vivon kiel serion da eksperimentoj; se unu ne sukcesas, oni faru duan, trian ktp. Oni postulu nur lojalecon, honestecon inter la homoj. Sed eble mi eraras, k estas preferinde, ke ruso edziĝu nur kun rusino, hispano kun hispanino aŭ eĉ samvilaĝano kun samvilaĝanino. Se ni ricevus bonan artikolon pri eŭgeniko, ni ja volonte enmetus. — E. L.

11 839. — Tiaj informoj taŭgas por ĉiutagaj ĵurnaloj, se ili estas telegrafe senditaj. Tial ni ne povas uzi vian en "S-ulo".

E. A., Malmö. — Vidu vian noton en "Kroniko". Bedaŭrinde ni ne povas enmeti senpage tiajn fotojn de grupoj ktp.

602. — Via artikoleto povas aperi nur kiel pagita anonco.

7349. — Viaj problemoj aperos.

13 090. — En "L. L." (13. 6.) vi trovos vian artikolon kun bildo. Red.

Girev. — "S-ulo" de 100 ĝis 136 ne plu estas ĉiuj haveblaj.

5448. — Pakaĵo de kovertoj revenis.

5627. — Kiun matrikulon havis K-do Livŝic? Adm.

Nekrologo

20. majo dronis en Dnepro nia juna fervora esperantisto

K-do M. LIVŜIC,

Kiev (Ukrainio).

Fininte elementan esp. kurson ĉe Kieva 6-a Laborlernejo, li aktive partoprenis esp. movadon, redaktis lernejan esp. gazeton, organizis esp. rondetojn. Pri lia antaŭtempa morto certe kun granda doloro sciiĝos liaj multnombraj amikoj-korespondantoj.

Viktorov-Ĉeĥoviĉ.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do Ludwig Spindlberger, Kaserne 3, Hof, T. 199, Krems a. D. (juna naturamiko), dez. koresp. kĉl.

K-do Gottfried Hofstätter (bakisto), Siringer Str. 94, Steyr, dez. koresp. kĉl, PI, bfl. Resp. garantiata.

BRITIO

K-do J. Bayliss (26 j., fervojisto), 115, Dickens St., Peterborough, dez. koresp. kĉl pri ĉ. temoj.

K-do Cecil Robertson, c/o Sanders, 204, Claythorn Str., Glasgow, Skotlando, dez. interŝ. L, PK, kĉl. Certe resp.

GERMANIO

K-do Walter Reschke (popolinstruisto), Ahrensdorf ap. Templin, Uk. M., dez. koresp. kĉl, krom Sovetio, pref. kun nordaj landoj. Resp. garant.

K-dino Ella Riedermaier, Ulmer Str. 16½, Augsburg, dez. koresp. kun K-dinoj el ĉl. pri virinaj k mastrumaj aferoj.

K-do Richard Bachmann, Ringstr. 51, Oppau (Pfalz), dez. koresp. kĉl. Gek-doj pri div. temoj, L, PK, PI, gaz.

K-do Joh. Wettig, Auergasse 4, Regensburg, dez. koresp. kĉl, L, PI, bfl. Resp. garantiata. Adreson skribu legeble!

HISPANIO

K-do Rafael Ferrer, Palomar, 4—4°, Zaragoza, dez. interŝ. PI kĉl.

SOVETIO

K-do P. D. Flantipov (seruristo), F-ka Krasilno-otdeloĉnaja raboĉaja Kazarma, 4, komn. 12, Serpuĥov, Mosk. gub., dez. koresp. pri div. temoj, kĉl. Resp. garantiata.

— Studanta grupo de agronoma teknikumo dez. koresp. kĉl. Resp. garant. Adr.: Tver, Selsko ĥozjastvennij teknikum, Studenta Grupo.

K-do Sinicin, Neftjanoj per. 5, Kamenskoje, Dneprop., okr., dez. koresp. kĉl. L, PK, PM, fotojn, gaz. Resp. garant.

K-do N. Gen (fotisto), Ĥmelnickogo, 17, kv. 3, foto „Ruhens", Odessa, dez. koresp. kĉl.

K-do W. Fuchs, ul. S. Ĥalturina, 38, Pokrovsk, ASSR, Np. (junkom. k radioamatoro), dez. koresp. kĉl.

K-do Petro Radomski, Niĵne-donskaja, 16/4, kv. 5, Smolensk, dez. interŝ. PK, PM, ankaŭ akceptas esp. librojn anstataŭ PM. Resp. ĉiam garantiata.

K-do Kurnaĉev, 3-a Sokolniĉja, 8, kv. 3, Moskvo-14, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. Resp. garantiata.

— Instruista k 12 gelernantoj de laborlernejo dez. koresp. kĉl, pri div. temoj. Resp. garantiata. Adr.: Ukrainio, Zinovjevsk, Trudŝkola, 4, al K-do Boĵor.

K-do Molokov-Ĵurski (edukisto), Pedagog. Teknikumo, Kremenĉug, dez. koresp. kĉl, pri natursciencoj (precipe pri botaniko k biologio).

K-do M. Ŝapirovski, Puŝkin-str. 45, Kremenĉug, dez. koresp. kĉl, pri lab. temoj, L, PK, gaz.

— Junpionira taĉmento de Kudr. Sindikato, Sojuz Ŝvejnikov, Kremenĉug, dez. koresp. kĉl pri kom. infanoj k junuloj, L, PK, PI, PM, gaz.

— Junpionira taĉmento "Jan Tomp", 1-a Maĥor. Fabrika, Kremenĉug, dez. koresp. kĉl kom. infanoj k junuloj, L, PK, jun. pion. gaz.

K-do I. Semjonov (junkom-isto, studento), Pedteknikumo, Barnaŭl, dez. koresp. kĉl junularo pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do A. Sikar, Pokrovski per., 12-IV., Odessa, dez. koresp. kĉl.

K-do Gr. Polak, Meringovska, 1/21, Kiev, dez. koresp. kun eŭrop- k amerikanoj pri foto-industrio, kun S.. Amer. ekonom. kondiĉ., interŝ. il. gaz.

K-do Jurij Mokrecov (junkom.), Voĵgaly, Vjat. gub., dez. koresp. kĉl, L, PI. Nepre resp.

K-dino M. Denisova, Sverdlovska ul. 15, Livny, Orlov. gub., dez. koresp. kĉl pri ĉ. temoj.

K-do V. Ĉernokun (40 j. forĝisto), Loŝkarivska detkolonio, Nikopol, Ukrainio, dez. koresp. kĉl pri lab. vivo.

K-do Paŭlo Platonov (35 j.), Lenin str. 58, Bogorodsk, Niĵegor. gub., dez, koresp. kĉl, pri ĉ. temoj.

K-do Boriso Pomomarev (25 j.), Suŝnikova, 6, Bogorodsk, Niĵeg. gub., dez. koresp. kĉl, pri ĉ. temoj.

K-dino Vera Kutarjova "Sad-gorod", str. Smolno, 18, Barnaul dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj, L, PI, fotojn gaz. ĵurn. Resp. garantiata.

K-do I. Demendjuk (formisto), str. Mamontova, 47, Barnaul, dez. koresp. kĉl. pri lab., profesiaj, politikaj aferoj, L, PK, gaz., ĵurn. Certe resp.

K-do F. Polakov (kalkulisto), str. 2-a Altajska, 111, Barnaul, dez. koresp. kun librotenisto k kalkulisto pri profes. temoj, L, PI. Certe resp.

K-do N. Kostin (oficisto), Stacio Bajanovo, Barnaul. distr., Omsk. ĵ. d., Siberio, dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PK, PI, PM, ĵurn., gaz. Resp. garant.

K-do Ŝicin (pentristo), str. 2-a Altajska, 56, Barnaul, dez. interŝ. spertojn k materialojn kun samfakanoj de ĉl., L, PK, PI, gaz., ĵurn.

K-do A. Borodulin (19 j. mekanikstudento), Privoznaja, 18, kv. 3, Nikolaev, Ukrainio, dez. koresp. kĉl pri profes. temoj, sporto, radio k. a. temoj.

K-doj Groĥman k Lyĵenko (metallaboristoj), Pervomajskaja, 30, Nikolaev, Ukrainio, dez. koresp. kĉl pri lab. vivo k. a. temoj.

SVEDIO

K-do D. Nordgren, Nygatan, 60, Visby, dez. interŝ. PI kĉl.

Atentu, Kongresontoj!

Kiu negermana K-do volos viziti nin antaŭ aŭ post nia 9-a Kongreso? Nia loko troviĝas 1½ fervoj-horojn de Leipzig meze de teksindustria centro saksia. Ni garantias senkostan restadon. Kiu interesiĝas pri tio, skribu al K-do Joh. Lorenz, Crimmitschau, Pleissenstr. 10, Germanio.

Gelernantoj de esp. kurso k teks-lana lernejo dez. daŭre k konstante koresp. kĉl. junularo, lernantaro k laboristaro pri profesiaj, lernejaj k junularaj demandoj, L, PK, PI, gaz., ĵurn. Skribu abunde k multnombre. Resp. garantias: SAT-peranto Ŝ. Goldfeder, str. Gogolo, 38, "Učebno-pokaz. ŝkola Omĥa", Barnaul (Sovetio).

K-do Hermann Konovalov, Teatralnaja pl. 6 kv. II, **Niĵnij-Novgorod,** deziras ricevi german- kaj anglalingvajn revuojn kaj librojn kontraŭ ruslingvaj aŭ PM. Sendu antaŭe proponojn.

Infanaro k lernantaro de ĉl. atentu!
En nia lernejo estas instruata esp-o kiel lernobjekto. Pruvu ĝian taŭgecon por int. edukado k solidareco. Koresp. abunde pri ĉ. lern., infan-pionir. k. a. temoj. Resp. garant. Tuja helpo necesas. Ni interŝ. gaz., ĵurnal., PM, PI, L, PK, flagojn ktp. Adr.: 8-a "Sovŝkola" Barnaul, Siberio, USSR.

Organiziĝinta en

LENINGRAD

ESPERANTISTA MEDICINA SEKCIO

ĉe Milit-Medicina Akademio dez. kunligi sian medicinan laboron kun ĉiuj

MEDICINISTOJ - ESPERANTISTOJ

el ĉl. — Peto: Sendu materialojn kaj diversajn sciigojn laŭ jena adreso:

USSR, **Leningrad,** Milit-Medicina Akademio, Nijegorodskaja, 14, jur-medicina katedro, Esperantista Medicina Sekcio.

Oficistaro k intelektularo de ĉ. l. atentu!
Nia esp-grupo (20 geoficistoj) dez. daŭre interŝ. gaz., ĵurnal., L, PI, PK, k koresp. k. ĉ. l. gekasistoj, gelibrotenistoj, librovendistoj, gekalkulistoj k kun aliprofesiuloj pri fakaj, politikaj k. a. t. Pruvo, ke esp-o estas taŭga interkorespondilo k interkomprenilo. Resp. garant. Adr.: "Grupkom Sovtorgsluĵaŝĉiĥ N 1, dom Sojuzov, Barnaul, Siberio, USSR.

ATENTU!

K-do Johano Jonov, Rjaĵsk, Rjaz. gub., Sovetio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn il. kun seriozaj K-doj, amator-kolektantoj de la tuta mondo, prefere kun Gek-doj de Sud- kaj Nord-Eŭropo, Azio kaj Ameriko. La K-do deziras ricevi PI, bfl., el serioj jenaj: Vidaĵoj de urboj, belartaj, naciaj tipoj ktp. Resp. garantiata.

SENPAGE

abonas la gaz. "Raboĉij Kraj" al siaj kunlaborantoj esp. gazetojn "S-ulo", "La Nova Epoko", AIZ, Pedagogia Revuo k. a. dum 3—6 monatoj, se ili sendas leterojn, artikoletojn kun fotoj pri vivkondiĉoj, laborkondiĉoj, profesiorganizoj, murgazetoj ktp. al "Esperant-Buro" ĉe gazeto "Raboĉij Kraj", **Ivanovo-Voznesensk, Mihajlovskaja n. 13, Sovetio.** — Respondo ankaŭ estas garantiata.

Gelaboristoj!

Esperanta Sekcio de Viborga Domego de Proleta Kulturo dez. havi viglan interkorespondadon pri ĉl. temoj, interesantaj gelaboristojn. La Sekcio havas konstantan grandan ekspozicion de koresp-ado kaj presaĵaro.

Adr.: USSR, **Leningrad,** Viborga Domo de Kulturo, Et. 3-a, ĉambro 10-a.

500000

gelaboristoj

tralegos vian leteron aŭ artikoleton pri profesiaj aferoj, novmetodoj en fabrikpreparado de teksaĵoj, vivmaniero, kulturaj kaj aliaj temoj, aperintan en Ivanovo-Voznesenska regiona gazeto "Raboĉij Kraj" (Laborista Regiono)

SENPAGE

oni rekomendos vin per esp. ĵurnaloj "S-ulo", "LNE", Bulteno de "SEU" kaj "VOKS".

SPORTO. KLERIGO!

12 esp. grupoj de klerigasocio TUR aranĝos konkursan korespondadon internacian pri laboristaj temoj. Leteroj, sendaĵoj, salutoj ktp. ricevitaj ĝis 23. VI. servos por gazetoj, lekcioj k ekspozicio dum junulara sportkongreso. Kun respondo ĉiu ricevos broŝureton pri la lingvo-uzo.

Adr.: **K-do K. Laskowski, Pollando, Bedzin, str. Ksawerowska 21.**

Leo Tolstoj

ĤODINKA

Sub tiu titolo baldaŭ aperos la vica (8-a) volumeto de "Biblioteko de Sennaciulo". Krom du rakontoj de la fama verkisto, ilustritaj per reproduktaĵoj de artpentraĵoj, la volumeto enhavas enkondukan artikolon de K-do N. Modenov kaj skizon de Akademiano V. Friĉe pri L. Tolstoj kiel moralisto.

Prezo: **0.60 mk. g.**

La mendojn oni adresu: SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27. — Sovetianoj al CK de SEU, Poŝtkesto 630, Moskvo.

GEKURSANOJ, ĉiuj en Tiflis o (Sovetio), deziras korespondadi kun K-doj ĉl. Adresoj: 1. K-dino Emilia Striŝkus, Krilovskaja ul. 9 (pri arto, precipe pri kino kaj opero); 2. K-dino Margarita Zviadadze, Ul. Ŝio Ĉitadze, 6 (pri esp.-movado en ĉl.); 3. K-dino Margarita Miĥaelis, Ul. Pleĥanovski, 64 (pri humora arto, interŝanĝo de humorgazetoj); 4. K-do Ardahanli Bagir, Ul. Bajramova, 26 (pri prostituo en kapitalistaj landoj); 5. K-do Alesker Husejnov, Ul. Ŝio Ĉitadze, 6 (pri proletliteraturo k gazetaro).

LA ĴUS FONDITA JUNULAR-SEKCIO

de Leningrada Esperantista Organizo

dez. koresp. kolektive k individue pri jenaj temoj: Junulara, profesia, laborista, IRH, liberpensula, jun.-pionira, sport-, radia k ŝakluda movadoj.

Skribu multnombre!
Respondo garantiata!

Adr.: USSR, **Leningrad,** Poŝtkesto, 305 al Junulsekcio de SEU.

Ĉe la Tver'a Gubkom de SEU estas organizita la oficejo de Meĵrabsvjazi. (Intern. lab. Interligo). Ni petas tutmondajn lab. organizojn interligiĝi pere de kolektiva koresp. kun lab. org. de la urbo Tver.

Adresu: Sovetio, **Tver,** ul. Volodarskago 18 kv. 3 al K-dino Filipova.

Fervojistoj!

Aliĝu al **"Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj"!**

Kotizo kun abono je monata organo "La Fervojisto" 1 dolaro aŭ egalvaloro jare.

La aliĝojn akceptas Administracio de SAT.

Ni rekomendas al vi nian literaturon!

Postulu la plej novan katalogon ĉe **Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.**

ENHAVO:

	pago
La usona imperialismo	345
Strikoj en Eldorado — Suda Usono	346
Oni vendas siajn privilegiojn!	346
Senbrida faŝismo en Jugoslavio	347
Sub la unuamaja standardo!	347
La teroro kontraŭ la laboristaj organizoj en Polio	348
Pri Nederlando	348—49
La morto de la virgulino	348—49
Diversaĵoj	349—50
El kvindekjara vivo en sovaĝejo	350
Sennaciula Virina Paĝo	351
Tra Esperantio	352—55
Korespondado	355
Anoncoj	356

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)